

MORTOPUNO

FAKTOJ & DOKUMENTOJ

SAT - Eldona Fako Kooperativa, Julio 2007

MORTOPUNO

FAKTOJ & DOKUMENTOJ

© SAT - Eldona Fako Kooperativa, Julio 2007

ISBN : 978-2-9528922-0-9

EAN : 9782952892209

Kontribuis al tiu ĉi libro, per redaktado, ilustrado, tajpado, korektado, enpaĝigo aŭ diverstipaj rimarkoj kaj sugestoj: Robin Beteau, Ronald Creagh, Toño del Barrio, Gunnar Gällmo, Fil Guichet, David Kelso, Kribo, Ansofi Markov, Vinko k Vito Markovo, Viola Murasaki, Barbara Petit, Platano, Arturo Prent, Frederiko Scibor, Paŭlo Signoret, Serĝo Sir, Manfredo Westermayer.

***Noto pri propraj nomoj:** la propraj nomoj estis laŭeble esperantigitaj, kiam uzitaj ene de la teksto, sed aperas sub nacilingva formo kiam ili nur indikas fontoreferencon. La ne-PIVaj nomoj estas klarigitaj en glosoj librofine. En kelkaj kazoj mankis tempo por proponi adekvatan esperantigon. Tiam la nomo aperas kursive.*

Enhavo

UNUA PARTO: VOĈOJ DE ARTISTOJ

Klaŭdo Mizerulo, Viktoro Hugo.....	21
Ne mortigu!, de Leo Tolstoj.....	65
Fablo pri gilotin-ŝraŭbeto, Nikolao Nekrasov	75
Ne mortigu!, Paŭlo Signoret.....	83

DUA PARTO: VOĈOJ DE MORTKONDAMNITOJ...

Deklaro de Ravaŝolo.....	97
Letero de Sako (Sacco) el la malliberejo	105
Letero al ĉiuj miaj amikoj, Julos Beaucarne	109
“Mi denove estis batita...”, Mumia Abu-Jamal.....	111
Usono: seninterrompa subpremo, Mumia Abu-Jamal	116

TRIA PARTO: FAKTOJ KAJ ARGUMENTOJ

Historio	121
Mortopuno tra la mondo en 2007.....	125
Argumentoj	131
Perspektivoj	145
Fontoj	147
Glosoj.....	149

Antaŭparolo de Ronald Creagh

La popoloj pli kaj pli timas. Reto de pravigitaj aŭ sensencaj timoj ĉiutage estas etendita de la amaskomunikiloj por interesi la popolon: la propagando pri krimeco nun estas parto de la ĉiutageco. Oni do postulas “*justan kompencan*”, kaj ĉar ne decas paroli pri venĝo, ĉiu imagas sin viktimo – hieraŭ, hodiaŭ aŭ morgaŭ. La molkoruloj parolas pri “*pardonpeto*”, la aliaj pri justeco, kaj ili konsideras ke la krimeco disvolviĝas kiam lando montriĝas tro indulga: “*la krimuloj, diras ili, kviete pasigus fiegan vivon*”. Ili deziras rehonorigon de la strikta gepatra kaj instruista disciplino, severecon de la juĝistoj kaj de la punoj, inkluzive uzon de la plej supera.

Ĉi tiuj argumentoj disvastigitaj en iuj tradiciistaj medioj riskas nun ĝeneraliĝi. La regantoj de la nunaj socioj, ĉefe zorgantaj pri rentodoneco, deziras pli kaj pli malinvesti en lerneja helpo, en

antaŭgardo fare de fakaj edukistoj, en reedukaj centroj, do en ĉio, kio ne alportas ekonomiajn avantaĝojn: “*Revenu en nia sistemo, se ne vi ne plu ekzistos*”.

Ĉi tiu sententemo pri personoj mem naskas krimojn. En ĉirkaŭaĵo kie ĉiuj interesiĝas pri ĉiuj, tuj videblas la strangaĵo, la nevidebleco de la malbonulo preskaŭ ne daŭras. Sed se vi oferos al la interesoj de minoritato la komunajn riĉaĵojn de socio atentema pri siaj membroj, vi spektos la disvolvon de malbonefikaj sociaj kunteksto sub la okuloj de feliĉe gapantaj ĵurnalistoj: skandala socia malegaleco⁽¹⁾, senpuneco de la multnaciaj entreprenoj kaj de la ĉefdecidantoj, fiskaj paradizoj, kaj sensenca urboetendiĝo, pri kiu estas sciate, ke ĝi multigas la homajn dramojn. Televido, aŭtomobilo, domnegoco, amasvendejoj, ĉiuj tiuj profitofontoj forprenas nin el interŝanĝoj kun personoj el sango kaj karno, kaj enŝlosas nin en mondo de fotoj, trafikŝtopiĝoj, liftoj kaj ĉekasaj vendejaj atendovicoj.

Do ni ne miru, ke la frenezan postkuron de fortunoj ĉiam pli kaj pli imponaj akompanas kreskanta maltoleremo al tiuj, kiuj pro diversaj kialoj, iel mispaŝis. La rendimentomaniuloj elmontras preskaŭ fanatikan mensan mallarĝecon por la defendo de la kolektivaj egoismoj. Konstruante doktrinon laŭ kiu la homaro dividiĝas en respekt-

indaj homoj kaj “*senutiluloj*”, amasiĝas la argumentoj prepare al ĉiuampleksaj militoj. La defendo de la pure korporaciaj intereso konkurencas la avidecon de la plej potencaj financistoj. Mafiemaj korupteco kaj tribeco nur povas disvolviĝi kun la elĉerpiĝo de la planedaj riĉaĵoj.

El pure ekonomia vidpunkto, estus malpli koste mortigi krimulon ol pagi stratajn edukistojn. Ankaŭ estas imagite, ke la timo pri tia puno farus el ĝi panaceon por deteni la krimulojn. Ĉi tiuj argumentoj estas falsaj, ĉar la faktoj kontraŭdiras tiujn aplombajn asertojn. Mortopuno estas nek la nura praktika solvo nek la malpli kosta, kiel videblas en Usono. La timo pri tiu ĉi kondamno ne malpliigas la krimecon, ĉar la eksterleĝeco naskiĝas en tute alia kunteksto. La sklavo de malbona pasio nur klopodas ne kaptiĝi. Li taksas la danĝeron kiel loteribiletan: li aĉetas karton esperante gajni.

La socio disponas pri mil eblaj punoj kaj mil rimedoj por malebligi al krimulo rekomenci. Ĝi povas kuraci frenezulojn aŭ protekti sin kontraŭ ili. Ĝi povas izoli la danĝerulon aŭ, eĉ pli bone, kiel proponis Elizeo Rekluzo, proponi al li “*rehonoriĝon per heroeco*”. Ja, malantaŭ sia impertinenta masko, la krimulo ofte tute ne havas memestimon, kaj sentas sin senvalorigita de la socio. Li bezonas pruvi al si mem sian valoron.

La ekzekuto de kulpulo estas konfeso pri socia fiasko. Tiu de senkulpulo, okazante pli ofte ol dirite, estas neriparebla ago. La postmortaj rehonorigoj estas kostaj kaj ili neniam revivigas la viktimon, nek redonas ĝin al ĝiaj amatoj. Tiel la laborfestoj de la unua de majo eĥas al la pendumo de laboristoj kondamnitaj pro eksplodo de bombo en Ĉikago en 1886 kaj kondamnitaj kvankam senkulpaj, pro siaj ideoj. La fiega ekzekuto en Bostono de Sako kaj Vanceti, en 1927, provokis la elmigradon de pluraj el la plej bonaj usonaj verkistoj, kaj certe estis bazo por la kontraŭusona sento en Eŭropo.

Ankaŭ eblas substreki, ke la decidoj de juĝo kaj de landa justico ne estas pli objektivaj ol tiuj de individuo: ili nur estas pli argumentitaj. Ni trudas nin kredi ke la ĵurianoj estas objektivaj, dum kiel ni, ili havas siajn konsciajn kaj nekonsciajn antaŭjuĝojn. Eĉ pli terure, la krimoj punataj de mortopuno varias laŭ la epokoj kaj landoj. En Francio, oni pli indulgis la murdon de nefidela edzino ol la murdon de nekonato. Tie ĉi, oni mortigas pro murdoprovo⁽²⁾, tie, pro spionado, aliloke por fiska eskapo aŭ pro samseksemeco.

Fakte, ĉiuj eblaj argumentoj neniam konvinkos apoganton de mortopuno, ĉar li alprenas, kiel ĉiu el ni, pasian starpunkton. Kial?

El ĉiuj rabobestoj, la homo certe estas la plej danĝera. En 50 000 jaroj, ĝi finmortigis ĉiujn grandajn animalojn, kiuj vivis en Aŭstralio. La genocido de la nordamerikaj indianaj triboj kiel tiu de la judoj dum la Dua Mondmilito enviciĝas sur longa listo, kiu daŭras ĝis nun kaj eble komenciĝis ĉe la apero de la homa specio. La militoj, tiuj grandaj historiaj amasbuĉadoj, estas taksataj “*normalaj*”, kaj tiuj kiuj ilin provokas ĝuas senpunecon. Male, oni nomas “*elstaraj konkerantoj*” Ĝingis-Ĥano, Aleksandro la Granda aŭ Napoleono. Tiuj, kiuj nun enkondukas militojn, tiuj kiuj organizis la sisteman bombadon de civiluloj en germanaj urboj aŭ en Nagasako neniam estis kondamnitaj, malgraŭ perforto de la internaciaj leĝoj. Je la nomo de “*milito*”, de “*justeco*”, de “*etna purigado*”, aŭ eĉ de “*demokratio*”, pluas la amasbuĉadoj, kaj ĉiam iuj voĉoj postulas pliajn mortojn.

Sendube, sufiĉas ke ŝtatestro aŭ registareco decidas ke iu estas la malamiko, ke iu ago – aborto, samseksemeco, adulto, murdo aŭ seksperforto – estu punata per morto, kaj tuj la popolo al tio aliĝos, same kiel ĝi akceptas, ke ĉi tiu sama ŝtat- aŭ registarestro havas la rajton pardoni. Tiel mortopuno dependas de subita principo iĝinta nediskutebla, universala kaj burokrata.

La popolamasoj ĝenerale eĉ estas pli kruelaj

ol siaj regantoj, pli favoraj al la uzo de mortopuno. Ili ne hezitas, se la laboro estas avantaĝe pagita, dungigi por fabrikado de mortigiloj. Ili preskaŭ ne ribelas kontraŭ la organizita detruo de la planedo, kiu minacas la vivon de la estontaj generacioj.

Tiel, al viro kaj virino mankas homeco, kaj tiuj, kiuj batalas por senperforteco estas minoritato. La plej multaj uloj tute ne taksas valora la vivon de nekonatuloj. Per troa uzo de la leĝo pri egala repago “*okulon pro okulo, denton pro dento*”, ni ĉiuj iĝas blindaj. Deziri la morton de aliulo signifas malkovri ke, kiel li, ni posedas murdinstinkton. Se memdefendo ĉiam estas pravigebla, la venĝo ĉiam estas iluzio. La leĝa ekzekuto de murdinto nek revivigas ĝian viktimon, nek konsolas la postvivantojn.

Ni honorigas rifuzante bleki kun la lupoj, kaj aliĝante al la vicoj de ĉiuj pioniroj kiuj, hieraŭ same kiel hodiaŭ kaj morgaŭ, defendas kaj defendos la homaron kontraŭ la abomeneco de ĝiaj murdaj impulsoj.

Ronald Creagh

Ronald Creagh (nask. 1929) estas sociologo, emerita profesoro en la universitato de Montpeliero (Francio), kaj aŭtoro de multaj studoj pri la anarĥisma movado, interalie de unu pri Sako kaj Vanceti. Li ankaŭ prizorgas retan esplorforumon pri anarĥismo : <http://raforum.info/>.

Notoj :

⁽¹⁾ En Usono, la mortopuno trafas eksterproporcie la plej malfortajn socitavolojn, alivorte la malriĉulojn kaj la rasajn aŭ etnajn minoritatojn. Inter ili, la nigruloj plu estas super-reprezentitaj en la mortohalo. En 2004, 42 procentoj el la kondamnitaj estas nigruloj, dum ili konsistigas nur 13 procentojn el al Usona loĝantaro.

Atestas la fratino de kondamnito: *“La juĝista korto estis instalita kiel por linĉado, la spektantaro dividita laŭ rasoj, la familio de la akuzito (ĉiuj nigruloj) dekstre kaj la familio de la viktimo (ĉiuj blankuloj) maldekstre.”*

Martina Correia, en Amnesty International <<http://www.amnesty.ch/fr/youth/actualite/magazine-amnesty/amnistie-43/la-peine-de-mort-une-histoire-de-famille>>

⁽²⁾ En 1892, ekzemple, *Jens Nielsen* estis kondamnita en Danio pro provo murdi sian malliberejan gardiston.

Enkonduko

La mortopuno estas mortigo de homo, plenumata de ekzekutiva povoinstanco, post juĝado, kiu agnoskis la kulpon de la juĝato. Ĝi do estas formo de leĝa mortigo diferenca de eŭtanazio, kiu estas la laŭleĝa mortigo de personoj decidata laŭ kriterioj aliaj ol tiuj de kulpeco. Ankaŭ la mortigoj rekte fare de policistoj aŭ dum militoj staras ekster mortopuno, pro la foresto de ia ajn juĝo. Male, iuj formoj de atencoj, plenumitaj de eksterleĝaj armitaj grupoj ja estas formo de mortopuno, kiam la decido estas alprenita de grupo, kiu konsideras sin rajtigita plenumi juĝojn kaj ekzekutojn.

En 2007, kiam mortopuno pli kaj pli aperas kiel malaperonta restaĵo de iamaj kruelaĵoj, kial plu kompili libron pri ĉi-tiu temo? Unue ĉar, se rigardi la situacion vere detale, nenio povas certigi, ke la kompleta malapero de mortopuno estas definitiva. En pluraj landoj, ekzemple lastatempe

Peruo kaj Pollando, ŝtatestroj esprimiĝis favore al ĝia rea enkonduko. Same, la projekto pri Eŭropa Konstituciiga Traktato antaŭvidis la eblecon uzi ĝin en kazoj, kiam la ŝtata sekureco estas endanĝerigita. Kaj se juĝi laŭ la rea popularigo de ekstremdekstraj ideoj en multaj, interalie eŭropuniaj registaroj, estas klare, ke plua atentemo restas necesa.

Due, indas ne forgesi, ke mortopuno plu estas aplikata en kelkaj ŝtatoj, kiujn la reganta ideologio nomas “*demokrataj*”. La kazo de Usono estas relative bone konata, sed tio ankaŭ validas por Japanio, kie ekzekutoj pli kaj pli oftigas lastatempe, kontraŭe al la ĝenerala monda tendenco, kun forta apogo al la juroministro flanke de la amaskomunikiloj, kiuj prisilentas multajn informojn, aparte pri la kruelegaj kondiĉoj de malliberigo kaj ekzekuto. Ankaŭ povas esti tiurilate utile memori pri la barbaraĵoj plenumataj antaŭnelonge en t.n. “*civilizitaj*” landoj, kie samtempe iuj permesis al si moralumi kaj kondamni la fojan uzon de perforto flanke de batalantoj por senekspluateca mondo.

Fine, la mortopuno estas nur la plej konata flanko de vasta problemaro, kiu koncernas la tutan punsistemon. Tiujn ĉi problemojn ofte preterlasas multaj kamaradoj, dum ili fakte estas intime ligitaj al la ceteraj sociaj problemoj.

Tiu ĉi libro estas la unua frukto de la nove fondita eldonkooperativo de SAT. La fakto, ke dudeko da kamaradoj iel kontribuis al ĝia pretigo jam estas kuraĝiga punkto, kaj unua paŝo al pretigo de dokumentoj pri sennaciece pritraktitaj temoj, eĉ se ne ĉiuj mondopartoj estis ekvilibre pritraktitaj ĉi-foje.

La libro dividiĝas en tri partoj. En la unua, artistoj levas diversajn demandojn pri mortopuno. En la dua parto, kondamnitaj mem esprimiĝas. Kaj fine venas kompilaĵo el faktoj kaj argumentoj favore al la abolo de mortopuno. El ĉio tio la legantoj espereble ĉerpos pensigan materialon, kiu ebligas al ili akiri propran opinion pri la temo, kaj eventuale el tiri praktikajn konkludojn por plua agado en la kadro, kiun ili mem opinios plej oportuna por tio.

Unua parto

Voĉoj de artistoj

Viktoro Hugo
Klaŭdo Mizerulo

Victor Hugo
Claude Gueux

La jena letero, kies originalo kuŝas en la oficejoj de la Pariza Revuo [Revue de Paris], tiel honoras la aŭtoron, ke ne eblas ne represi ĝin tie ĉi. Ĝi nun estas ligita al ĉiu represo de Klaŭdo Mizerulo.

En Dunkirko, la 30an de julio 1834.

Sinjoro la direktoro de la Pariza Revuo,

Klaŭdo Mizerulo, de Viktoro Hugo, de vi enŝovita kun via liveraĵo de la 6a, estas elstara leciono; helpu min, mi petas, diskonigi ĝin.

Helpu al mi, petas mi, presigante je mia kosto tiom da ekzempleroj, kiom estas da deputitoj en Francio, kaj ilin sendante individue kaj precize al ili.

Mi havas la honoron saluti vin.

Karlo Karljero [*Charles Carlier*],
Negocisto.

Antaŭ sep aŭ ok jaroj, viro nomiĝanta Klaŭdo Mizerulo, malriĉa manlaboristo, vivis en Parizo. Kun li vivis junulino, kiu estis lia amantino, kaj infano de tiu junulino. Mi diras la aferojn tiaj, kiaj ili estas, lasante la leganton pluki la moralajojn tie, kie la faktoj ilin semis laŭ la vojiro. La laboristo estis kapabla, diligenta, inteligenta, tre malbone dotita de la edukado, tre bone dotita de la naturo, nescianta legi sed scianta pensi. Iun vintron mankis laboro. Nek fajro, nek pano en la domaĉo. La viro, la junulino kaj la infano frostis kaj malsatis. La viro ŝtelis. Mi ne scias kion li ŝtelis, mi ne scias kie li ŝtelis. Tio, kion mi scias, estas, ke el tiu ŝtelo rezultis tri tagoj da pano kaj fajro por la ino kaj la ido, kaj kvin jaroj da malliberejo por la viro.

La viron oni sendis penti en la centra malliberejo de Klarvaŭso [*Clairvaux*]. Klarvaŭso, abatejo el kio oni faris bastilion, pi-ĉelo el kio oni faris pun-ĉelon, altaro el kio oni faris pilorion. Kiam ni parolas pri progreso, tiel iuj ĝin komprenas kaj aplikas. Jen kion ili deduktas el nia vorto.

Ni daŭrigu:

Tien alveninte, oni lin metis en karceron nokte kaj en laborejon tage. Ne la laborejon mi mallaŭdas.

Klaŭdo Mizerulo, antaŭ nelonge honesta labor-

isto, ekde nun ŝtelisto, estis digna kaj gravmiena homo. Kun alta frunto, jam sulkita kvankam ankoraŭ juna, kelkaj grizaj haroj kaŝitaj en la nigraj tufoj, okulo milda kaj forta, profunde lokita sub belkontura brovosto, malfermaj naz-truoj, mentono elstarema, lipo fiera. Temas pri bela besto. Ni vidos kion la socio faris el ĝi.

Li estis vortavara, prefere gestema, kun io graveca kaj obeiganta en lia tuta personeco, pensema mieno, serioza prefere ol suferanta. Tamen suferinta li ja estis.

En la ejo, kie Klaŭdo Mizerulo estis malliberigita, estis laborejdirektoro, speco de funkciulo specifa al malliberejoj, kiu proksimas kune al giĉetisto kaj al vendisto, kiu samtempe mendas de manlaboristo kaj minacas malliberulon, kiu provizas vin per laborilo ĉe la mano kaj per kateno ĉe la piedo. Tiu ĉi estis mem subspeco, viro seka, tiraneca, obeanta siajn ideojn, ĉiam senindulge aŭtoritata; krom tio, foje, bona kamarado, bonkora princo, ĝojema eĉ kaj gracie ŝercanta; senkompata prefere ol firma; rezonanta kun neniuj, eĉ ne kun si; bona patro, bona edzo, sendube, kio estas devo kaj ne virto; unuvorte, ne malafabla, malbonintenca. Li estis unu el tiuj homoj kiuj estas nek vibraj nek elastaj, kiuj fontas el inertaj molekuloj, kiuj resonas pro ŝoko kontraŭ neniuj ideoj, ĉe kontakto kun neniuj sentoj, kiun

trafas glaciaj koleroj, senkoloraj malamoj, senemociaj maltrankviliĝoj, kiuj ekbrulas sen varmiĝi, kies varmretena kapablo estas nula, kaj kiuj ofte ŝajnas el ligno; ili brulas ĉe unu ekstremaĵo kaj estas malvarmaj ĉe la alia. La ĉefa linio, la diagonala linio de la karaktero de tiu homo estis la malreznemo. Li fieris esti malreznema, kaj sin komparis al Napoleono. Tio estas nur vida iluzio. Multaj homoj pro ĝi trompiĝas kaj, je ia distanco, vidas malreznemon volo, kaj kandelon stelo. Kiam do tiu homo certiĝis pri tio kion li nomis sia volo rilate absurdaĵon, li paŝas kun altlevita kapo kaj tra ĉia vepro ĝis la fino de la absurdaĵo. Seninteligenta obstinemo estas idioteco lutita ĉe la pinto de stulteco kaj al ĝi utilanta kiel plilongigaĵo. Tio estas eĉ pli grava. Ĝenerale, kiam katastrofo privata aŭ publika frakasiĝis sur nin, se ni analizas, laŭ la restaĵoj kiuj kuŝas tere, la manieron laŭ kiu ĝi konstruiĝis, ni preskaŭ ĉiam eltrovas, ke ĝin konstruis homo mezaĉa kaj obstina kiu fidis sin kaj sin admiris. Troviĝas en la mondo multaj el tiuj obstinaj fatalemuloj kiuj sin kredas providenculoj.

Jen do kio estis la direktoro de la laborejoj de la centra malliberejo de Klarvaŭso. Jen el kio konsistis la fajrigŝtono per kiu la socio ĉiutage frapis sur la malliberulojn por eltiri fajrerojn.

La fajreron kiun tiaj fajrigŝtonoj tiras el tiaj

ŝtonoj ofte ekfajrigas forbrulegojn.

Ni diris, ke post lia alveno en Klarvaŭso, al Klaŭdo Mizerulo oni indikis numeron kaj lin direktis al laboro. La laborejdirektoro ekkonis lin, lin taksis bona manlaboristo, kaj lin bone traktis. Laŭdire iun tagon eĉ, estante bonhumora kaj vidante Klaŭdon Mizerulon malĝojega, ĉar tiu ĉi viro daŭre pensis pri tiu, kiun li nomis sia edzino, li raportis al li, pro ĝojemo kaj okupomanko, kaj ankaŭ por lin konsoli, ke tiu kompatindulino iĝis publikulino. Klaŭdo malvarmvoĉe demandis kio iĝis la infano. Oni ne sciis.

Post kelkaj monatoj, Klaŭdo kutimiĝis al la mallibereja etoso, kaj ŝajnis pensi pri nenio plu. Iu asketa kvieto, propra al lia karaktero, re-trudiĝis al li.

Post proksimume la sama tempopaso, Klaŭdo akiris strangan influkapablon sur siajn kamaradojn. Kvazaŭ pro nedirita interkonsento, kaj sen konata kialo, eĉ ne de li, ĉiuj tiuj viroj lin konsultis, aŭskultis, admiris kaj imitis, kio estas la plej supra grado de admiro. Ne estis mezgrava gloro esti obeata de ĉiuj tiuj naturaj malobeemuloj. Tiu aŭtoritato estiĝis por li sen ia klopodo. Tio fontis el la rigardo kiu animis liajn okulojn. La okuloj de homo estas fenestro tra kiu vidiĝas la pensoj kiuj naskiĝas en la kapo.

Metu homon kiu entenas ideojn inter homoj kiuj ideojn ne entenas, post difinita tempo, kaj pro nekontraŭstarebla altiriĝo, ĉiuj mallumaj cerboj gravitos humile kaj admiroplene ĉirkaŭ la radiantanta cerbo. Homo estas ĉu fero, ĉu magneto. Klaŭdo estis magneto.

En daŭro de malpli ol tri monatoj do, Klaŭdo iĝis la animo, la leĝo kaj la ordo de la laborejo. Ĉiuj tiuj montriloj turniĝis sur lia horloĝo. Certe li mem foje dubis ĉu li estas reĝo aŭ malliberulo. Temis pri speco de papo kun siaj kardinaloj malliberigita.

Kaj, pro tute natura reago, kies efekto montriĝas je ĉiuj niveloj, amata de la malliberuloj, li estis malamegata de la malliberigantoj. Tio ĉiam tiel estas. Popularecon ĉiam akompanas malfavoro. Amon de la sklavoĵ ĉiam apudas malamego de la mastroj.

Klaŭdo Mizerulo estis manĝegulo. Tio estis aspekto el lia naturo. Li havis tiel organizitan stomakon, ke la nutraĵo de du ordinaraj viroj apenaŭ sufiĉis al li por la tago. Sinjoro De Kotadiljo [*de Cotadilla*] havis tian apetiton, kaj tio amuzis lin; sed kio estas ĝojokialo por duko, hispana nobelo, kiu posedas kvincent mil ŝafojn, estas ŝarĝo por manlaboristo kaj malfeliĉo por malliberulo.

Klaŭdo Mizerulo, kiam libera en sia subtegmento, laboris la tutan tagon, pergajnis sian kvarfuntan panon kaj ĝin manĝis. Klaŭdo Mizerulo, en malliberejo, laboris la tutan tagon kaj nevarieble ricevis pro sia laboro unu funton kaj duono da pano kaj kvar uncojn da viando. La porcio estas nemodifebla. Klaŭdo do kutime malsatis en la Klarvaŭsa malliberejo.

Li malsatis, kaj jen ĉio. Li ne parolis pri tio. Tia estis lia naturo.

Iun tagon, Klaŭdo ĵus forvoris sian nemalsatigan porcion, kaj reekis al sia laboro, pensante forgesi sian malsaton laborante. La aliaj malliberuloj ĝoje tagmanĝis. Junulo pala, blanka, malforta, lokis sin apud li. Li tenis en sia mano sian porcion, kiun li ĝis nun ne ekmanĝis, kaj tranĉilon. Li tiel staris apud Klaŭdo, ŝajne dezirante paroli kaj ne aŭdacante. Tiu viro, kaj lia pano, kaj lia viando, tedis Klaŭdon.

- Kion vi volas? li abrupte diris.
- Ke vi helpu al mi, timeme diris la junulo.
- Kion ? pluis Klaŭdo.
- Ke vi helpu min por manĝi tion. Estas tro por mi.

Larmo briligis la fieran okulon de Klaŭdo. Li prenis la tranĉilon, duonigis la porcion de la junulo en du egalajn partojn, prenis unu el ili, kaj

ekmanĝis.

- Dankon, diris la junulo. Se vi bonvolas, ni tiel kundividos ĉiutage.

- Kiel vi nomiĝas? Klaŭdo Mizerulo diris.

- Albeno.

- Kial vi troviĝas ĉi-tie? daŭrigis Klaŭdo.

- Mi ŝtelis.

- Kaj ankaŭ mi, Klaŭdo diris.

Ili fakte tiel kundividis ĉiutage. Klaŭdo Mizerulo estis tridek ses-jara, kaj foje li ŝajnis kvindek, pro la severeco de lia kutima pripensado. Albeno estis dudek-jara, oni lin taksus deksep, pro la plue senkulpecaj okuloj de tiu ŝtelisto. Intima amikeco teksiĝis inter ambaŭ viroj, amikeco de patro al filo prefere ol de frato al frato. Albeno estis ankoraŭ preskaŭ infano; Klaŭdo estis jam preskaŭ maljunulo.

Ili laboris en la sama ejo, ili tranoktis sub la sama volbo, ili promenis en la sama korto, ili mordis al la sama pano. Ĉiu el ambaŭ amikoj estis la universo de la alia. Ŝajnas ke ili estis feliĉaj.

Ni jam parolis pri la direktoro de la laborejoj. Tiu homo, malamata de la malliberuloj, estis ofte devigata, por iĝi obeata de ili, postuli helpon de Klaŭdo Mizerulo, kiu de ili estis amata. Plurfoje, por malhelpi ribelon aŭ tumulton, la

sentitola aŭtoritato de Klaŭdo Mizerulo subtenis la oficialan aŭtoritaton de la direktoro. Kaj fakte, por trankviligi la malliberulojn, dek vortoj de Klaŭdo egalas dek ĝendarmojn. Klaŭdo multfoje tiun servon plenumis por la direktoro. Tial do la direktoro lin kore malamamis. Li ĵaluzis tiun ŝteliston. Li tenis funde en la koro sekretan malamon, envian, senkompatan, kontraŭ Klaŭdo, malamon de titola suvereno al fakta suvereno, de surpapera povo al fakta povo.

Tiuj ĉi malamoj estas la plej aĉaj.

Klaŭdo multe amis Albenon kaj ne pensis pri la direktoro.

Iun tagon, iun matenon, kiam la ŝlosil-portisto translokis duope la malliberulojn el la dormejo al la laborejo, giĉetisto vokis Albenon kiu estis apud Klaŭdo, kaj lin avertis ke la direktoro lin atendas.

- Kion oni volas de vi? diris Klaŭdo.

- Mi ne scias, Albeno diris.

La giĉetisto forkondukis Albenon.

La mateno forpasis, Albeno ne revenis al la laborejo. Kiam estis tagmanĝohoro, Klaŭdo pensis ke li retrovos Albenon en la korto. Albeno ne estis en la korto. Oni reiris al la laborejo. La tago tiel forpasis. Vespere, kiam oni rekondukis la malliberulojn al ilia dormejo, Klaŭdo tie okule serĉis Albenon, kaj lin ne vidis. Ŝajnas ke li multe

suferis tiam, ĉar li alparolis giĉetiston, kion li neniam faris kutime:

- Ĉu Albeno estas malsana? li diris.

- Ne, respondis la giĉetisto.

- Pro kio do, daŭrigis Klaŭdo, li ne reaperis hodiaŭ?

- Ha! neglekte diris la ŝlosil-portisto, tio signifas ke oni metis lin en alian kvartalon.

La ĉeestintoj kiuj poste raportis pri tio rimarkis, ke je tiu respondo de la giĉetisto la mano de Klaŭdo, kiu tenis fajrigitan kandelon, iom tremetis. Li kviete pluis:

- Kiu ordonis tion?

- S.D.

La direktoro de la laborejoj nomiĝis S.D.

La morgaŭa tago forpasis kiel la antaŭa tago, sen Albeno.

Vespere, je la laborĉesa horo, la direktoro, S.D., venis por sia kutima kontrolvizito en la laborejo. Tuj kiam Klaŭdo ekvidis lin, li formetis sian ĉapon el dika lano, li butonumis sian grizan jakon, malgaja uniformo de Klarvaŭso, ĉar principo en malliberejoj estas ke respektoplene butonumita jako favore influas la superulojn, kaj li lokis sin stare kaj kun sia ĉapo en la mano antaŭ sia benko, atendante la preterpason de la direktoro. La direktoro preterpasis.

- Sinjoro! Klaŭdo diris.

La direktoro haltis kaj turnis sin duone.

- Sinjoro, Klaŭdo rekomencis, ĉu estas vere ke Albenon oni translokis en alian kvartalon?

- Jes, la direktoro respondis.

- Sinjoro, Klaŭdo daŭrigis, mi bezonas Albenon por vivi.

Li aldonis:

- Vi scias ke mi ne havas sufiĉe por manĝi per la tiea porcio, kaj ke Albeno dividis sian panon kun mi.

- Tio koncernis lin, la direktoro diris.

- Ĉu ne estus eble remeti Albenon en la saman kvartalon kie mi estas?

- Neeble. Decido estis farita.

- De kiu?

- De mi.

- Sinjoro D., Klaŭdo rekomencis, temas pri vivo aŭ morto por mi, kaj tio dependas de vi.

- Mi neniam postmodifas miajn decidojn.

- Sinjoro, ĉu mi faris ion kontraŭ vi?

- Nenion.

- Do, diris Klaŭdo, kial vi disigas min de Albeno?

- Tial, diris la direktoro.

Post tiu klarigo, li preterpaŝis.

Klaŭdo tiam mallevis la kapon kaj ne rebatis. Kompatinda enkaĝa leono kies hundon oni forprenis.

Ni nepre diru ke la ĉagreno de tiu disiĝo neniel ŝanĝis la iel malsanecan voremon de la mal-liberulo. Nenio cetere ŝajnis ŝanĝiĝinta en li. Li parolis pri Albeno al neniu kamarado. Li promenis sole en la korto dum la paŭzhoroj, kaj li malsatis. Nenio plia.

Dume tiuj, kiuj bone konis lin, rimarkis ion malbonaŭguran kaj malhelan kiu ĉiutage pli kaj pli intensiĝis sur lia vizaĝo. Krome, li estis pli milda ol iam ajn.

Pluraj volis dividi sian porcion kun li, li rifuzis kun rideto.

Ĉiuvespere, de post la klarigo kiun donis al li la direktoro, li faris iuspecan frenezaĵon ĉe homo tiel serioza. En la momento kiam la direktoro, reaperanta je fiksa horo pro sia kutima inspektado, pasis antaŭ la metiilo de Klaŭdo, Klaŭdo levis la okulojn kaj lin fikse rigardis, kaj poste li alparolis lin, laŭ tono angor- kaj koler-plena kiu esprimis samtempe petegon kaj minacon, per jenaj du vortoj nur: Kaj Albeno? La direktoro ŝajnis ne aŭdi aŭ forpaŝis levante la ŝultrojn.

Tiu homo malpravus levi la ŝultrojn, ĉar estis evidente por ĉiuj spektantoj de tiuj strangaj

scenoj ke Klaŭdo Mizerulo estas interne firme decidinta ion. La tuta malliberejo angore atendis la rezulton de tiu lukto inter malrezignemo kaj decidemo.

Oni konstatis iun fojon, ke Klaŭdo Mizerulo diris al la direktoro:

- Aŭskultu, Sinjoro, redonu al mi mian kamaradon. Vi bone faros, kredu min. Notu ke mi tion diras al vi.

Alian fojon, iun dimanĉon, ĉar li troviĝis en la korto, sidanta sur roko, kun la kubutoj sur la genuoj kaj la frunto inter la manoj, senmova de pluraj horoj en la sama pozicio, la kondamnito Fajeto [*Failllette*] aliris lin, kaj kriis ridante:

- Kion diable vi tie faraĉas, Klaŭdo?

Klaŭdo malrapide levis sian severan kapon, kaj diris:

- Mi juĝas iun.

Unu vesperon fine, la 25an de oktobro 1831, kiam la direktoro inspektadis, Klaŭdo brue rompis sub sia piedo brakhorloĝan vitraĵon, kiun li trovis matene en koridoro. La direktoro demandis de kie venas tiu bruo.

- Estas nenio, Klaŭdo diris, estas mi. Sinjoro direktoro, redonu al mi mian kamaradon.

- Neeble, la mastro diris.

- Tamen tio necesas, diris Klaŭdo basvoĉe sed

firme, kaj fronte rigardante la direktoron, li aldonis: pripensu. Hodiaŭ estas la 25a de oktobro. Mi lasas al vi ĝis la 4a de novembro.

Iu ĝiĉetisto tiam rimarkigis al S.D. ke Klaŭdo lin minacis kaj ke tio pravigas ĉelpunon.

- Ne, nenia ĉelpuno, diris la direktoro kun malŝatema rideto, ni estu bonkoraj kun tiuj homoj!

La morgaŭon, la kondamnito Pernoto [*Pernot*] alparolis Klaŭdon, kiu promenis sole kaj penseme, lasante la aliajn malliberulojn petoli en malgranda sunkvadrato ĉe la alia flanko de la korto.

- Hej do! Klaŭdo, pri kio vi pensas? Vi ŝajnas malgaja.

- Mi timas, Klaŭdo diris, ke baldaŭ okazos malbonaĵo al tiu bonkora S.D.

Estas naŭ plenaj tagoj de la 25a de oktobro ĝis la 4a de novembro. Klaŭdo preterlasis eĉ ne unu por grave averti la direktoron pri la pli kaj pli dolora situacio en kiu metis lin la malapero de Albeno. La direktoro tedite iun fojon punis lin per dudek-kvar horoj da ĉelumo, ĉar la petego tro similis minaĉon. Jen ĉio, kion Klaŭdo ricevis.

Jen la 4a de novembro. Tiun ĉi tagon, Klaŭdo vekiĝis kun serena vizaĝo, kia oni neniam vidis de post la tago kiam la decido de S.D. disigis lin de lia amiko. Je ellitiĝo, li priserĉis specon de

blankoligna kesto kiu troviĝis ĉe la litpiedo kaj entenis kelkajn vestaĉojn. De ĝi li elprenis kudristinan tondilon. Tio estis, krom difektita ekzemplero de Emilo [*l'Emile*], la sola posedaĵo kiu postrestis de la amitino, de la patrino de lia ido, de lia iama hejmeto. Jen du havaĵoj senutilaj por Klaŭdo; la tondilon povas uzi nur ino, la libron nur klerulo. Klaŭdo sciis nek kudri nek legi.

Dum traĭro de la malnova senhonorigita kaj perkalke blankigita korto, kiu uziĝas vintre kiel vagejo, li alpaŝis la kondamniton Ferario [*Ferrari*], kiu atente rigardadis la dikegajn stangojn de kradbarilo. Klaŭdo tenis enmane la tondileton, li ĝin montris al Ferario dirante: Ĉi-vespere mi tondos tiujn ĉi stangojn per tiu ĉi tondilo.

Ferario, seniluzia, ekridis, kaj ankaŭ Klaŭdo.

Tiun ĉi matenon, li laboris pli arde ol kutime; neniam li faris tiel rapide kaj bone. Ŝajnas ke li aparte klopodis fini dum la mateno pajloĉapelon antaŭpagitan de honesta burĝo el Trojeso [*Troyes*], S. Bresjero [*Bressier*].

Iom antaŭ tagmezo, li pro ia preteksto mal-supreniris al la lignaĵista laborejo situanta teretaĝe, sub la etaĝo kie li laboris. Klaŭdo estis tie same amata kiel aliloke, sed malofte venis. Pro tio:

- Vidu! jen Klaŭdo!

Oni ĉirkaŭis lin. Festokialo. Klaŭdo rapide

okulumis la ĉambron. Neniu el la gardistoj ĉe-
estis.

- Kiu havas pruntedoneblan hakilon por mi? li
diris li.

- Por kion fari? oni demandis lin.

Li respondis:

- Tio estas por mortigi ĉi-vespere la laborej-
direktoron.

Oni prezentis al li plurajn hakilojn por elekto.
Li prenis la plej etan kiu estis tre akuta, ĝin kaŝis
en sian pantalonon, kaj eliris. Tie troviĝis dudek
sep malliberuloj. Li ne postulis de ili sekreton.
Ĉiuj ĝin respektis.

Ili eĉ ne priparolis la aferon inter si.

Ĉiu atendis siaflanke tion, kio okazos. La afero
estis terura, rekta kaj simpla. Ne eblis kompliki.
Klaŭdo estu nek konsilita, nek denunciata.

Unu horon poste, li alparolis junan kondamn-
iton deksesjaran kiu enuis en la vagejo, kaj lin
konsilis lerni legadon. Tiam la malliberulo Fajeto
alpaŝis Klaŭdon, kaj lin demandis kion diable li
kaŝaĉas tie ĉi en sia pantalono. Klaŭdo diris:

- Temas pri hakilo por mortigi S.D. ĉi-vespere.

Li aldonis:

- Ĉu tio videblas?

- Iomete, Fajeto diris.

La cetero de la tago pasis kiel kutime. Je la sepa vespere, oni enŝlosis la malliberulojn, ĉiun sektion en la responda laborejo; kaj la gardistoj eliris el la laborĉambroj, kiel ŝajne estas la kutimo, por reveni nur post la inspektado de la direktoro.

Klaŭdo Mizerulo do estis enŝlosita kiel la aliaj en sia laborejo kun siaj laborkunuloj.

Tiam okazis en tiu laborejo eksterordinara sceno, sceno ne sen grandeco nek sen teruro, la sola tiuspeca nepriskribebla en iu ajn alia rakonto.

Ĉeestis tie, kiel konstatis la jura enketo kiu okazis poste, okdek du ŝtelistoj, inkluzive de Klaŭdo.

Post kiam la gardistoj lasis ilin solaj, Klaŭdo leviĝis sur sia benko, kaj anoncis al la tuta ĉe-estantaro, ke li deziras diri ion. Oni eksilentis.

Tiam Klaŭdo laŭtigis sian voĉon kaj diris:

- Vi ĉiuj scias, ke Albeno estas mia frato. Mi ne havas sufiĉe por manĝi per tio, kion oni donas al mi. Eĉ per aĉeto de nur pano per la malmulto, kiun mi perlaboras, tio ne sufiĉas. Albeno dividis sian porcion kun mi, mi lin ekamis unue ĉar li nutris min, poste ĉar li amis min. La direktoro, S.D., nin disigis, tio ne ĝenis lin, ke ni estis kune;

sed li estas malbona homo, kiu ĝuas turmenti. Mi petis lin ree Albenon. Tion vi vidis? li mal-konsentis. Mi lasis al li ĝis la 4a de novembro por redoni al mi Albenon. Li ĉelpunis min pro tiu diro. Mi, dum tiu ĉi tempo, juĝis kaj kondamnis lin al morto, hodiaŭ estas la 4a de novembro. Li venos post du horoj por sia inspektado. Mi avertas vin, ke mi mortigos lin. Ĉu vi havas rimarkon pri tio?

Ĉiuj plu silentis.

Klaŭdo daŭrigis. Li parolis, ŝajne, per aparta elokvento, kiu cetere estis tute natura por li. Li asertis, ke li ja konscias ke li perforte agos, sed kredas ne malpravi. Li certigis al la okdek-unu ŝtelistoj, kiuj lin aŭskultis, kaj al ilia konscio. Ke li estas ĉe akra limo. Ke la neceso mem juĝi por si estas senelirejo, en kiu oni foje estas engaĝita. Ke verdire li ne povas forpreni la vivon de la direktoro sen fordoni sian propran, sed ke li opinias bona la fordonon de sia vivo por justa kialo. Ke li estas longe pripensinta, kaj pri tio nur, de du monatoj. Ke li kredas bona ne lasi sin invadi de venĝemo, sed ke, en la kazo laŭ kiu tiel estus, li petegas, ke oni tuj avertu lin. Ke li honeste submetas siajn motivojn al la justaj homoj, kiuj lin aŭskultas. Ke li do mortigos S.D., sed ke se iu havus rimarketon li pretas ĝin aŭskulti.

Nur unu voĉo aŭdiĝis kaj diris, ke antaŭ mort-

igi la direktoron, Klaŭdo devas lastfoje provi paroli al li kaj cedi lin.

- Tio estas justa, Klaŭdo diris, kaj mi tion faros.

Oke sonoritis la granda horloĝo. La direktoro devis veni je la naŭa.

Post kiam tiu kasacia kunveno kvazaŭ ratifis la kondamnon kiun li juĝis, Klaŭdo reĝis tute serena. Li metis sur tablon ĉion, kion li posedis kiel tolaĵon kaj vestaĵon, la malriĉan restaĵon de la malliberulo, kaj, vokante laŭvice tiujn el liaj kunuloj, kiujn li plej ŝatis post Albena, li ĉion disdonis. Li konservis nur la tondileton.

Sekve li ĉiujn brakumis. Kelkaj ploris, al tiuj li ridetis.

Okazis dum tiu horo lasta momentoj kiam li parolis tiel kviete kaj eĉ gaje, ke pluraj el liaj kamaradoj interne esperis, kiel ili poste raportis, ke li eble forlasos sian decidon. Li unu fojon eĉ amuziĝis nazblove estingante unu el la malmultaj kandletoj, kiuj lumigis la laborejon, ĉar li havis malbonajn edukajn kutimojn kiuj ombrigis lian naturan dignecon pli ofte ol indus. Nenio povis malebligi, ke tiu eksa stratbubaĉo foje odoris parizan stratkloakon.

Li ekvidis junan kondamniton kiu estis pala, kiu lin fikse rigardis, kaj kiu tremis, sendube pro tio, kion li estis vidonta.

- Nu do, kuraĝon, junulo! Klaŭdo milde diris al li, tio daŭros nur momenteton.

Post kiam li findisdonis ĉiujn siajn vestaĵaĉojn, finadiaŭis, finpremis ĉies manojn, li ĉesigis kelkajn malkvietajn babilojn kiuj aŭdiĝis tie kaj ĉi-tie en mallumaj anguloj de la laborejo, kaj li ordonis, ke oni rekomencu labori. Ĉiuj silente obeis.

La laborejo, kie tio okazis, estis longeca, longa paralelogramo borita de fenestroj sur ambaŭ longaj flankoj, kaj de du pordoj kiuj sin frontis ĉe la du ekstretoj. La laboriloj estis lokitaj ambaŭflanke apud la fenestroj, la benkoj orte ĉe la muro, kaj la restanta libera spaco inter ambaŭ laborilaj vicoj formis specon de longa vojo, kiu iris rekte de unu pordo al la alia kaj tiel trairis la tutan ĉambron. Tiun longan vojon, sufiĉe mallarĝan, devis trairi la direktoro dum sia inspektado; li devis eniri tra la suda pordo kaj eliri tra la norda, post rigardado al la laboristoj dekstre kaj mal.

Kutime li tiun vojon trairis sufiĉe rapide kaj senhalte.

Klaŭdo mem reinstaliĝis ĉe sia benko kaj reekis al la laboro, kiel Jakvo Klemento [*Jacques Clément*] reekis al preĝado.

Ĉiuj atendis. La momento proksimiĝis. Subite aŭdiĝis sonorila bato. Klaŭdo diris: Estas kvar-

ono antaŭ. Tiam li leviĝis, gravpaŝe trairis parton de la ĉambro, kaj surkubutiĝis ĉe la angulo de la unua laborilo maldekstre, tuj apud la enirpordo. Lia vizaĝo estis tute trankvila kaj bonvola.

Sonoris la naŭa. La pordo malfermiĝis. La direktoro eniris.

Je tiu momento ekestis en la laborejo statua silento.

La direktoro estis sola kiel kutime.

Li eniris kun sia vizaĝo ĝoja, memkontenta kaj neŝanĝebla, ne vidis Klaŭdon kiu staris maldekstre de la pordo, kun la dekstra mano kaŝita en la pantalone, kaj rapide pasis antaŭ la unuaj laboriloj, kappendole, maĉante siajn vortojn, ĵetante tien kaj ĉi-tien sian banalan rigardon, sen ekvidi, ke ĉiuj okuloj, kuj ĉirkaŭis lin fiksiĝis sur terura ideo.

Subite li abrupte turnis sin, surprizita pro aŭdo de paŝbruo malantaŭ si.

Temis pri Klaŭdo kiu silente sekvis lin de kelkaj paŝoj.

- Kion ci faras tie? la direktoro diris; kial ci ne estas sur cia loko?

Ĉar homo ne plu estas homo tie, ĝi estas hundo, kiun oni ciumas.

Klaŭdo respektoplene respondis:

- Ĉar mi bezonas paroli al vi, Sinjoro direktoro.

- Pri kio?

- Pri Albeno.

- Denove! diris la direktoro.

- Daŭre! diris Klaŭdo.

- Ha nu, daŭrigis la direktoro plu paŝante, do ne sufiĉis al ci dudek-kvar horoj da ĉelpuno?

Klaŭdo respondis plu sekvante lin:

- Sinjoro direktoro, redonu al mi mian kamaradon.

- Neeble.

- Sinjoro direktoro, Klaŭdo diris per voĉo kiu mildigus Satanon, mi petegas vin, remetu Albenon kun mi, vi vidos kiel mi bone laboros. Al vi, kiu estas libera, ne gravas, vi ne scias kio estas amiko; sed havas mi nur la kvar murojn de la malliberejo. Povas iri kaj foriri vi, dum mi havas nur Albenon. Redonu lin al mi. Albeno nutris min, vi tion ja scias. Kostus al vi nur la penon diri jes. Ĉu gravas al vi ke estas en sama ĉambro iu homo kiu nomiĝas Klaŭdo Mizerulo kaj alia kiu nomiĝas Albeno? Ĉar ne estas pli komplike ol tio. Sinjoro direktoro, bona mia sinjoro D., mi vere petegas vin tre!

Klaŭdo eble neniam tiom diris al gardisto unu-bloke. Post tiu klopodo, elĉerpita, li atendis. La direktoro rebatis kun incitita gesto:

- Neeble. Punkto, fino. Nu, ne plu parolu al mi pri tio. Ci tedas min.

Kaj ĉar urĝis al li, li plirapidigis la paŝon. Klaŭdo ankaŭ. Tiele parolante, ili estis ambaŭ atingintaj la elirpordon; la okdek ŝtelistoj rigardis kaj aŭskultis, sufokante.

Klaŭdo milde tuŝis la brakon de la direktoro.

- Sed almenaŭ sciu mi kial mi estas mortkondamnita. Diru al mi kial vi disigis lin de mi?

- Mi jam diris tion, respondis la direktoro. Tial.

Kaj, turnante la dorson al Klaŭdo, li levis manon al la tenilo de la elirpordo.

Je la respondo de la direktoro, Klaŭdo estis retroirinta unu paŝon. La okdek statuoj, kiuj ĉeestis, ekvidis lian dekstran manon eliri el la pantalono kun la hakilo. Tiu mano leviĝis, kaj antaŭ ol la direktoro povis ekkri, tri hakilfrapoj, terure estas raportitaj, en saman fendon trafintajn, frakasis lian kranion. Dum li plankenfalis, kvara bato vundstrekis lian vizaĝon; kaj, ĉar ekinta furiozo ne ĉesas tuj, Klaŭdo Mizerulo fendis lian femuron per kvina senutila frapo. La direktoro mortis.

Tiam Klaŭdo ĵetis la hakilon kaj kriis: *La alian nun!* La alia estis li. Oni lin vidis eltiri el sia jako

la tondileton de *“lia edzino”*, kaj, dum neniu ekhavis la ideon malhelpi lin, li ilin entrudis en sian bruston. La klingo estis mallonga, la brusto estis profunda. Li longe traserĉis kaj pli ol dudekfoje kriante: *“Koro de damnito, mi do vin ne trovos!”* Kaj fine li falis bananta en sia sango, svena sur la mortinton.

Kiu el la du estis viktimo de la alia?

Kiam Klaŭdo elsveniĝis, li kuŝis en lito, kovrita per tolaĵoj kaj bendoj, de ĉie kuracata. Li havis apud si preĝulinojn, kaj plie juĝiston kiu oficis kaj kiu demandis lin kun videbla intereso:

- Kiel vi fartas?

Li perdis grandan kvanton da sango; sed la tondilo per kiu li naive esperis mortfrapi sin malbone plenumis sian taskon, neniu el la vundoj faritaj estis danĝera. Estis mortiga por li nur la vundoj faritaj al S.D.

La pridemandoj komenciĝis. Oni petis lin ĉu mortigis li la laborejdirektoron de la klarvaŭsa malliberejo. Li respondis: Jes. Oni demandis lin kial. Li respondis: Tial.

Dume, iam liaj vundoj infektiĝis; lin trafis akra febro pro kiu li preskaŭ mortis.

Novembro, decembro, januaro kaj februaro forpasis kurace kaj prepare. Kuracistoj kaj juĝ-

istoj urĝis sin ĉe Klaŭdo; unuaj kuracis liajn vundojn, aliaj muntis lian mortoŝtuparon.

Ni mallongigu. La 16an de marto 1832, li staris, komplete resaniĝinta, antaŭ la Trojesa juĝistaro. La urba homamaso estis kiel eble plej densa.

Klaŭdo estis decaspekta antaŭ la juĝfronto; oni lin razis atente, lia kapo estis nuda, li surhavis tiun sobran vestaĵon de la klarvaŭsaj malliberuloj, kudrita egalece per du nuancoj de grizo.

La juristo leĝe reprezentanta la reĝon plenkambris la ĉambelon per ĉiuj marŝsoldatoj de la distrikto, *“tiel,”* li diris dum la proceso, *“ke ĉiuj krimulaĉoj, kiuj devos raportari pri la afero, estos regataj”*.

Kiam devis komenciĝi la debato prezentiĝis notinda malfacilaĵo. Neniu el la ĉeestintoj dum la eventoj de la 4a de novembro volis raportari kontraŭ Klaŭdo. La prezidanto minacis ilin arbitre mem decidi pri la faktoj okazintaj. Vane. Tiam Klaŭdo komandis al ili raportari. Ĉiuj langoj malnodiĝis. Ili diris ĉion, kion ili vidis.

Klaŭdo aŭskultis ĉiujn kun profunda atento. Kiam iu el ili, pro forgeso, aŭ pro simpatio por Klaŭdo, nediris faktojn kulpigantajn la akuziton, Klaŭdo reĝustigis ilin.

De raportado al raportado, la serio de la faktoj,

kiujn ni ĵus detaligis, disvolviĝis antaŭ la ĉeestantaro.

Je iu momento, la inoj, kiuj ĉeestis, ekploris. La pordisto vokis la kondamniton Albeno. Estis lia vico raporti. Li eniris ŝanceliĝante; li singultis. La ĝendarmoj ne sukcesis malhelpi lin fali en la brakojn de Klaŭdo. Klaŭdo lin subtenis kaj diris ridetante al la reĝa reprezentanto: “*Jen krimulo, kiu dividas sian panon kun tiuj, kiuj malsatas.*” Kaj li kisis la manon de Albeno.

Post elĉerpo de la listo de raportantoj, Sro la reĝa reprezentisto leviĝis kaj ekparolis per tiuj vortoj: “*Sinjoroj juristoj, la socio estus fundamente ŝancelita, se la publika krimpunado ne trafus la gravajn kulpulojn kiel tiu ĉi, kiu, ktp*”.

Post tiu memorinda prelego, la advokato de Klaŭdo parolis. La argumentado kontraŭ kaj la argumentado por rondiris, laŭvice, kiel kutime en tiu speco de ĉevalkurado, kiun oni nomas krimproceso.

Klaŭdo opiniis, ke ne ĉion oni diris. Li leviĝis siavice. Li parolis tiele, ke inteligenta persono kiu ĉeestis tiun tagon poste eliris forte mirigita. Ŝajnas ke tiu malriĉa manlaboristo entenis ja prefere oratoron ol murdiston. Li parolis starante, per voĉo traftona, kun okulo klara, honesta kaj decidema, kun preskaŭ ĉiam sama gesto, sed

plena je impono. Li diris la aferojn kiel ili estas, simple, serioze, sen pliigi nek malpliigi, li konsentis ĉion, rigardis fronte la artikolon 296, kaj metis sian kapon sub ĝi. Estis momentoj de vera elokventeco kiuj vekigis homamasan reagon, kaj dum kiuj ripetiĝis flustre en la aŭskultantaro tio, kion li ĵus eldiris. Tio estigis murmuron dum kiu Klaŭdo paŭzetis fiere okulumante al la ĉeestantaro. Dum aliaj momentoj, tiu homo, kiu ne sciis legi, estis milda, delikata kiel malanalfabeto; kaj, ankoraŭ alimomente, modesta, modera, atenta, popaŝe antaŭenirante la jukan parton de la diskuto, bonvolema por la juĝistoj. Unu fojon nur, li allasis sin al kolera impulso. La reĝa reprezentisto deduktis en sia prelego, kiun ni entute citis, ke Klaŭdo Mizerulo murdis la laborejdirektoron sen motivo kaj sen perforto flanke de la direktoro, do sen provoko.

- Kion! ekkriis Klaŭdo, min oni ne provokis! Ha! jes, vere, estas juste. Mi komprenas vin. Ebria homo pugnobatas min, mi lin mortigas, mi estis provokita, vi indulgas min, vi sendas min galeren. Sed homo, kiu ne estas ebria kaj kiu estas plenkonscia premas mian koron dum kvar jaroj, hontigas min dum kvar jaroj, pikas min ĉiutage, ĉiuhore, ĉiuminute, per kudrilpiko en neatenditan lokon dum kvar jaroj! Mi havis edzinon por kiu mi ŝtelis, li turmentas min per tiu edzino; mi

havis infanon por kiu mi ŝtelis, li turmentas min per tiu infano; mi ne havas sufiĉe da pano, amiko donas al mi panon, li forprenas mian amikon kaj mian panon. Mi petas ree mian amikon, li punas min ĉele. Mi viumas lin, lin fiulo, li ciumas min. Mi diras al li, ke mi suferas, li diras al mi, ke mi tedas lin. Do kion mi faru laŭ vi? Mi mortigas lin. Bone, mi estas monstro, mi mortigis tiun homon, mi ne estis provokita, vi fortranĉas de mi la kapon. Faru!

Belega gesto, laŭ ni, kiu subite prilumis, super la sistemo de materiala provokado, sur kiu apogas sin la malbone proporciita taksilo de la indulgigaj cirkonstancoj, tutan teorion de la morala provokado forgesita de la leĝo.

Post fermo de la debatoj, la prezidanto resumis objekte kaj lumklare. Rezultis tio: aĉa vivo; ja monstro; Klaŭdo Mizerulo komence vivis kun publikulino; poste li ŝtelis; poste li murdis. Ĉio ĉi estas vera.

Antaŭ sendi la juristojn al ilia ĉambro, la prezidanto demandis la akuziton ĉu li havas ion por diri pri la formo de la demandoj.

- Malmulte, Klaŭdo diris. Jen, tamen. Mi estas ŝtelisto kaj murdisto. Mi ŝtelis kaj mi murdis. Sed kial mi ŝtelis? kial mi murdis? Metu tiujn du demandojn apud la aliaj, sinjoroj juristoj.

Post kvaronhoro da decidiĝo, laŭ la deklaro de la dekdu ĉampanianoj, kiujn oni nomis sinjoroj juristoj, Klaŭdo iĝis mortkondamnita.

Certe estas, ke jam ĉe la malfermo de la debatoj, pluraj el ili rimarkis ke la akuzito nomiĝas Mizerulo, kio forte impresis ilin.

Oni legis la decidon antaŭ Klaŭdo, kiu diris nur: *Bone. Sed kial tiu homo ŝtelis? Kial tiu homo murdis? Jen du demandoj al kiuj ili ne respondas.*

Reveninte en la malliberejon, li gaje vespermanĝis kaj diris: tridek ses jarojn faritajn!

Li ne volis peti kasacion. Unu el la preĝulinoj kiu kuracis lin plore petegis lin tion fari. Li petis pro kompato al ŝi. Sajnas, ke li kontraŭstaris ĝis la lasta momento, ĉar kiam li subskribis sian peton sur la registrolibron, la leĝa limperiodo tritaga forpasis de kelkaj minutoj. La dankema kompatindulino donacis al li kvin frankojn. Li prenis la monon kaj dankis.

Dum lia peto estis ekzamenata, forfuĝproponoj alvenis flanke de la malliberuloj el Trojeso, kiuj ĉiuj sindonis. Li rifuzis. La malliberuloj ĵetis sinsekve en lian ĉelon tra la truo najlon, ferfadenon kaj siteltenilon. Ĉiu el tiuj iloj sufiĉus, por homo tiel inteligenta kiel Klaŭdo estis, por liberiĝi. Li redonis la tenilon, la ferfadenon kaj la najlon al la ĝiĉetisto.

La 8an de junio 1832, sep monatoj kaj kvar tagoj post la ago, la puno alvenis, kun sia lama piedo, kiel oni vidas. Tiun ĉi tagon, je la sepa matene, skribjuristo eniris la ĉelon de Klaŭdo, kaj anoncis al li, ke restas al li nur unu horon da vivo. Lian peton oni rifuzis.

- Nu, diris Klaŭdo malvarmvoĉe, mi bone dormis tiun ĉi nokton sen suspekti, ke mi eĉ pli bone dormos la venontan.

Laŭdire la diroj de fortaj homoj ĉiam ricevas ian grandecon pro proksimiĝo de la morto.

La pastro alvenis, kaj poste la ekzekutisto. Li estis humila kun la pastro, milda kun la alia. Li rifuzis nek la spiriton, nek la korpon.

Li konservis perfektan spiritan liberecon. Dum oni tondis liajn harojn, iu parolis, en angulo de la ĉelo, pri la ĥolero kiu tiam minacis Trojeson.

- Kaj mi, Klaŭdo diris, tute ne timas ĥoleron.

Li cetere ekstreme atente aŭskultis la pastron, multe kulpigante sin kaj bedaŭrante ke oni ne instruis lin religiece.

Pro peto lia, oni redonis al li la tondilon, per kiu li frapis sin. Mankis al ĝi unu klingo, kiu rompiĝis en lia brusto. Li petis la ĉeliston doni tiun tondilon al Albeno. Li ankaŭ diris ke li deziras, ke oni aldonu al tiu heredaĵo la panpor-

cion kiun li devus manĝi tiun ĉi tagon. Li petis tiujn, kiuj ligis al li la manojn, meti en lian dekstran la kvinfrankan moneron kiun donacis al li la preĝulino, la sola afero kiu restis al li tiam.

Je kvarono antaŭ la oka, li eliris el la malliberejo, kun la tuta kutima mortĉirkaŭaĵo de la kondamnitoj. Li iris piede, pala, kun la okulo fiksita al la krucifikso de la pastro, sed daŭre firme paŝante.

Oni elektis tiun tagon por la ekzekutado ĉar estis bazartago, tiel ke estus kiel eble plej multe da rigardoj dum lia traĵo; ĉar ŝajne plu restas en Francio duonsovaĝaj vilaĝetoj, kie, kiam la socio mortigas homon, ĝi fieras pri tio.

Li suprengrimpis la mortoŝtuparon gravmiene, kun la okulo daŭre fiksita al la krista umilo. Li volis kisi la pastron, kaj poste la ekzekutiston, dankante la unuan, pardonante la alian. La ekzekutisto milde forpuŝis lin, diras raportinto. Kiam la helpisto lin ligis sur la malbelegan meĥanikaĵon, li signis al la pastro preni la kvinfrankan moneron kiun li havis en la dekstra mano, kaj diris al li: *Por la malriĉuloj*. Ĉar la oka sonoris tiam, la bruo de la horloĝa sonorturo maskis lian voĉon, kaj la konfesigisto respondis al li ke li ne aŭdis. Klaŭdo atendis dum du notoj kaj milde ripetis: *Por la malriĉuloj*.

La oka noto ne jam sonoris kaj tiu nobla kaj

inteligenta kapo falis.

Admirinda efiko de la publikaj ekzekutoj! Tiun ĉi saman tagon, ĉar la maŝino ankoraŭ staris meze de ili kaj ne purigita, la homoj de la bazaro amasiĝis pro tarifa kialo kaj preskaŭ mortperfortis impostiston. Kiel mildan popolon faras tiuj ĉi leĝoj!

Ni pensis, ke ni devas rakonti detale la historion de Klaŭdo Mizerulo, ĉar, laŭ ni, ĉiuj paragrafoj de tiu rakonto povus utili kiel enkonduko al ĉiuj ĉapitroj de la libro, en kiu solviĝus la granda problemo de la popolo en la deknaŭa jarcento. En tiu grava vivo estas du ĉefaj partoj, antaŭ la disfalo, post la disfalo; kaj, sub tiuj du partoj, du demandoj, demando de la edukado, demando de la punado; kaj, inter tiuj du demandoj, la entuta socio.

Tiu homo, certe, estis bone naskita, bone konstituita, bone dotita. Kio do mankis al li? Pripensu.

Jen la granda problemo de proporcio kies solvo, trovota, donos la ekvilibron universalan: La socio ĉiam faru por la individuo tiom, kiom la naturo.

Vidu Klaŭdon Mizerulon. Cerbo bonstata, koro bonstata, sendube. Sed la fato metas lin en tiel malbonstatan socion, ke li fine murdas.

Kiu efektive kulpas? Ĉu li? Ĉu ni?

Severaj demandoj, jukaj demandoj, kiuj koncernas nun ĉiujn inteligentojn, kiuj tiras nin ĉiujn senescepte per la ŝtofo de nia vestaĵo, kaj kiuj iam tiel komplete forbaros al ni la vojon, ke ja necesos ilin rekte fronti kaj scii, kion ili postulas.

Tiu, kiu skribas tiujn liniojn, eble baldaŭ provos diri, kiel li komprenas ilin.

Kiam oni alfrontas tiajn faktojn, kiam oni pensas pri la maniero, laŭ kiu tiuj demandoj premas nin, oni demandas sin pri kio pensas tiuj, kiuj estas ĉe la povo, ĉu ili pensas aŭ ne pri tio.

La parlamentoj, ĉiujare, estas grave okupitaj. Sendube estas tre grave forigi la sendevajn postenojn kaj malgrasigi la buĝeton; estas tre grave prepari leĝojn tiel, ke mi iru, soldate travestiita, patriote garddeĵori antaŭ la pordo de S-ro la grafo de Lobaŭo [*Lobau*], kiun mi ne konas kaj kiun mi ne volas koni, aŭ por trudi min paradi en la korto Marinio [*Marigny*], pro la deziro de mia spicisto, el kiu oni faris mian oficion.

Grave estas, ĉu por deputitoj ĉu por ministroj, elĉerpi kaj harfendadi ĉiujn aferojn kaj ĉiujn ideojn pri tiu lando per diskutoj abortoriĉaj; nepre estas, ekzemple, fingromontri kaj pri-demandi skandalite, kaj sen scii kion oni diras, la arton de la deknaŭa jarcento, tiun grandan kaj severan akuziton kiu eĉ ne volas respondi kaj ja

prefere tiel; utile estas pasigi sian tempon, por ŝtatestroj kaj leĝistoj, en klasikaj konferencoj kiuj ŝultrolevigas la ĉirkaŭurbajn instruistojn; utile estas deklari, ke la moderna dramo inventis inceston, kokradon, patromurdon, idomurdon kaj venenmurdon, kaj tiel pruvi, ke oni konas nek Fedron, nek Jokaston, nek Edipon, nek Medeon, nek Rodogunon; nepre estas, ke la politikistaj oratoroj de tiu lando skermaĉadas, dum tri tagoj, pri buĝeto, por Kornelio kaj Racino, kontraŭ oni ne scias kiu, kaj profitas el tiu literatura okazaĵo por pikadi unu la alian senretene per grandaj franclingvaj eraroj.

Ĉio tio estas grava; ni opinias tamen, ke povus esti aferoj ankoraŭ pli gravaj.

Kion dirus la parlamento, meze de tiuj supraĵaj disputaĉoj, kiuj tiel ofte provokas atakojn de la kontraŭuloj kontraŭ la ministraro kaj de la ministraro kontraŭ la kontraŭuloj, se, subite, el la benkoj de la parlamento aŭ de la publika sidejo, ajne, iu leviĝus kaj dirus tiujn seriozajn parolojn:

“Silentu, sinjoro Maŭgeno [Mauguin], silentu sinjoro Tierso [Thiers]! vi kredas pritrakti la ĝustan demandon, vi misiras. Jen la demando: La justico, ĵus antaŭ apenaŭ unu jaro, dispecigis homon en Pamjerso [Pamiers] per malgranda kruda tranĉileto; en Diĵono, ĝi ĵus forŝiris kapon

de ino; en Parizo, ĝi faras, ĉe la barilo Sankt-Jakvo, novformajn ekzekutojn. Tio estas la demando. Pritraktu tion. Vi kverelos poste por scii, ĉu la butonoj de la nacia gardistaro devas esti blankaj aŭ flavaj, kaj ĉu certiĝo estas pli bela afero ol sendubiĝo.

“Sinjoroj el la centroj, sinjoroj el la ekstretoj, la plimulto de la popolo suferas! Egale ĉu vi ĝin nomas respubliko aŭ nomas monarĥio, la popolo suferas. Tio estas fakto.

“La popolo malsatas, al la popolo malvarmas. Mizereco trudas al krimo aŭ al malvirto, laŭ la sekso. Kompatu la popolon, kies filojn prenas la malliberejo, kaj kies filinojn la malĉastulejo. Kion pruvas tiuj du ulceroj! Ke la socia korpo havas fiaĵon en la sango. Jen vi kunvenas por kuraci la malsanulon; zorgu pri la malsano.

“Tiun malsanon vi malbone prizorgas. Studu ĝin pli bone. La leĝojn kiujn vi faras, kiam vi faras ilin, estas nur paliativoj kaj trukoj. Duono de viaj kodoj estas tradicia, la alia duono estas eksperimenta. La puncikatro estis kaŭterado, kiu rezultigis gangreniĝon de la vundo; sensenca puno tiu, kiu ĝismorte stampis kaj algluis la krimon sur la krimulon! kiu el ili faris du amikojn, du kamaradojn, du nedisigeblulojn! La malliberejo estas absurda filtrilo, kiu lasas reenflui, sed nur post eĉ plimalbonigi ĝin, preskaŭ ĉion el

la malbona sango, kiun ĝi elsuĉas. La mortopuno estas barbara ablacio.

“Nu, puncikatro, malliberejo, mortopuno, tri kongruaj aferoj. Vi forigis la puncikatron, se vi estas logikaj, forigu la ceteron. La ruĝvarma fero, la trenbulo kaj la kapklingo, estis la tri partoj de silogismo. Vi formetis la ruĝvarman feron, la trenbulo kaj la kapklingo ne plu havas sencon. Farinaso [Farinace] estis terura; sed li ne estis absurda.

“Malmuntu do tiun malnovan laman ŝtuparon de la krimoj kaj punoj, kaj refaru ĝin. Refaru vian punleĝon, refaru viajn kodojn, refaru viajn malliberejojn, refaru viajn juĝistojn. Ĝisdatigu viajn leĝojn laŭ la moroj.

“Sinjoroj, tro da kapoj fortranĉiĝas pojare en Francio. Ĉar vi strebas al ŝparado, ŝparu pri tio. Ĉar vi ĉie forigas postenojn, forigu la ekzekutiston. Per la salajro de viaj okdek ekzekutistoj, vi pagos sescent instruistojn.

“Pensu pri la plimulto de la popolo. Lernejoj por la infanoj, laborejoj por la viroj. Ĉu vi scias, ke Francio estas unu el la eŭropaj landoj, kie plej malmulte da homoj scipovas legi? Kion! Svisio scipovas legi, Belgio scipovas legi, Danio scipovas legi, Grekio scipovas legi, Irlando scipovas legi, kaj Francio ne scipovas legi? Honte.

“Iru en la malliberejojn. Voku ĉirkaŭ vi la punitaron. Ekzamene rigardu unuope ĉiujn tiujn damnitajn de la homa leĝo. Kalkulu la angulon de tiuj profiloj, palpu tiujn kraniojn. Ĉiu el tiuj falintaj homoj havas sub si sian bestan tipon; ŝajnas ke ĉiu el ili estas vojkruciĝo inter tiu aŭ tiu ĉi besta specio kaj la homaro. Jen la cervolupo, jen la kato, jen la simio, jen la vulturo, jen la hieno. Nu, por tiuj malbone faritaj kapoj, la unua kulpo estas de la naturo sendube, la dua de la edukado. La naturo malbone skizis, la edukado malbone poluris la skizon. Flegu en ĉi-tiu direkto. Bona edukado por la popolo. Disvolvu kiel eble plej bone tiujn kompatindajn kapojn tiel, ke la inteligento, kiu kuŝas ene povos kreski. La nacioj havas bone aŭ malbone faritan kranion laŭ sia edukistemo. Romio kaj Grekio havis altan frunton. Malfermu plej larĝe eble la profilan angulon de la popolo.

*“Kiam Francio scipovos legi, ne lasu sen orientiĝo tiun inteligenton, kiun vi estos disvolvinta. Tio estus alia malordo. Nescio valoras tamen pli ol malbona scienco. Ne. Memoru ke ekzistas libro pli filozofa ol **Kamarado Mateo** [Compère Mathieu], pli populara ol **Konstitucia** [Constitutionnel], pli eterna ol la ĉarto de 1830. Temas pri la sankta skribaĵo. Kaj jen klariga vorto. Spite al tio, kion vi faras, la sorto de la*

granda amaso, de la multeco, de la plimulto, ĉiam estos relative malriĉa, kompatinda kaj malfeliĉa. Por ĝi la kruda laboro, la ŝarĝo puŝenda, la ŝarĝo trenenda, la ŝarĝo portenda. Ekzameni tiun pesilon: ĉiuj ĝuoj en la riĉula plato, ĉiuj mizeroj en la malriĉulo. Ĉu la du partoj ne estas malegalaj? Ĉu la pesilo ne devus kliniĝi, kaj kun ĝi la ŝtato? Kaj nun en la loton de la malriĉulo, en la mizeran platon, ĵetu la certecon de ĉiela estonteco, ĵetu la strebon al eterna feliĉo, ĵetu la paradizon, mirinda kontraŭpezo! Vi reĝustigas la ekvilibron. La parto de la malriĉulo estas same riĉa kiel la parto de la riĉulo. Tion sciis Jesuo, kiu sciis pli ol Voltero.

“Donu al la popolo, kiu laboras kaj suferas, donu al la popolo, por kiu tiu ĉi mondo malbonas, la kredon al pli bona mondo farita por ĝi. Ĝi estos trankvila, ĝi estos pacienca. La pacienco konsistas el espero.

“Do prisemu evangeliajn vilaĝojn. Po unu biblio por ĉiu kabano. Ĉiu libro kaj ĉiu kampo produktu kune moralan laboriston.

“La kapo de la popola homo, jen la demando. Tiu kapo estas plena de utilaj ĝermoj. Utiligu por maturigi ĝin kaj disvolvi ĝin tion, kio plej lumas kaj plej bone mezuras en la virto. Tiu murdis sur la grandaj vojoj, kiu, pli bone aldirektita, estintus la plej bona servisto de la civito. Tiun

kapon de la popola homo kulturu, prilaboru, akvumu, prisemu, prilumu, moraligu, utiligu; vi ne bezonos ĝin fortranĉi.”

Postparolo de la tradukinto

Ni konsciu, ke mortopuno en Francio estis fine abolita nur en 1981, do ĉirkaŭ cent jarojn post la morto de Hugo... Rimarkinde ankaŭ estas la absurdaĵo, ke malsanan kondamniton oni zorgeme kuracas antaŭ mortigi lin; fakte tion oni ankoraŭ faras en Usono: malsanan homon oni ne rajtas ekzekuti, kio povas kaŭzi konsciencproblemojn al kuracistoj, ĉar per kuracado ili nerekte sed fakte mortigas siajn pacientojn.

Viktoro Hugo (1802-1885) verkis ĉi tiun rakonton preskaŭ tuj post la fino de antaŭa samtema: *La lasta tago de mortkondamnito*. Tamen la du verkoj estas esence malsamaj en tio, ke la unue verkita celas emociigi la leganton kaj per subjektiva teksto (tagĵurnalo de mortkondamnito) veki kompatemon kaj abomenon pri la mortopuno dum ĉi-tiu objektive (almenaŭ elekstere) priskribas vivon kaj morton de simpla ŝtelisto laŭ malvarma sed senkompata stilo, kvankam el la vera rakonto la aŭtoro prenis nur la deziratajn aspektojn. Ja tra Klaŭdo Mizerulo,

Hugo kaptas plian okazon kontraŭbatali kaj kritiki la punsistemon (fakte do ne nur la mortopunon mem) kaj la tutan socion ĝenerale en longa fina klarigado de sia tiama sinteno pri la demando.

Interesa estas ĝuste tiu pripensado fina de la aŭtoro. Konstatante la fuŝecon de la sociordo, li vidas nura solvo al la problemo sisteman elementan edukadon por ĉiuj, riĉaj aŭ mal. Kiam oni scias iom la katolikemon de Hugo, ne surprizas la rekta laŭdo al religio kaj “*reĝustigo*” de la riĉula/malriĉula pesilo per aldono de paradiza promeso en la malriĉulan platon. Efektive se li prave indignis kontraŭ la malriĉeco de “*la mizeruloj*”, li neniam kontraŭis la senliman pliriĉiĝon de la potenculoj kaj ĝenerale pensis, ke libera(la) komercado solvos ĉiujn problemojn pri militoj! Nu notinde tamen estas, ke, estinte komence reĝisto, li evoluis maldekstren dum sia tuta (longa) vivo kaj fine preskaŭ subtenis la Parizan Komunumon, eĉ mem implikiĝis por amnestiigi komunumanojn...

Do eĉ se ŝerce oni povas diri, ke li ĉion maltrafis de du jaroj je naskiĝo (“*tiu jarcento estis dujara...*”) kaj morto (li mortis en 1885, esperanto naskiĝis en 1887...), honeste oni devas konsenti, ke tra lia tuta verko (almenaŭ romana) kaj politika aktivado li ĉiam reliefigis sian zorgemon

pri la “*socia demando*” kaj postlasis altnivelan literaturon pripensigan.

Konklude mi substreku, ke tiu verko el la junaĝo (sendepende de la dogmeca flanko religieca) estas taŭga enkonduko al larĝa debato ne nur pri mortopuno, sed ankaŭ pri tiuj “*du demandoj, demando de la edukado, demando de la punado; kaj, inter tiuj du demandoj, la entuta socio*”.

Vito Markovo

Leo Tolstoj

NE MORTIGU !

*Tiun ĉi tekston publikigis Tolstoj en 1900, reage al la tiam okazintaj anarĥiistaj atencoj en Rusio. Ĝi provokis grandan skandalon ĉe sia apero, kaj tuj estis cenzurita. Malgraŭ tio, ĝi rapide disvastiĝis kaj estis tradukita en multajn lingvojn. La esperanta versio, pretigita de Kribo, jam aperis en la kadro de SAT-Broŝurservo – **Laŭte!** en 1974 kaj 1981.*

Kiam oni ekzekutas, laŭ la formoj de l'justico, iujn reĝojn: Karlon la I-an, Ludovikon la XVI-an, Maksimilianon de Meksikio, aŭ kiam oni buĉas ilin okaze de kortega revolucio: Petron la III-an, Paŭlon la I-an, diversajn sultanojn, ŝahojn kaj ĉiniajn imperiestrojn, tio estas faktoj, kiujn oni ĝenerale prisilentas. Sed kiam oni forigas ilin sen la justica aparato kaj ekster kortegaj revolucioj, kiel Henrikon la IV-an, Aleksandron la II-an, la aŭstrian imperiestrinon, la persan ŝahon, kaj freŝdate la reĝon Humberto, tiuj murdoj naskas ĉe la imperiestroj, la reĝoj kaj ties kunvivantaro, ĝeneralajn indignon kaj surprizon, kvazaŭ tiuj suverenoj mem ne partoprenus murdadojn, ne profitus de ili kaj ilin ne ordonus.

Tamen la murditaj reĝoj, eĉ la plej bonaj, kiaj Aleksandro la II-a kaj Humberto, kulpis aŭ komplicis en la murdado de miloj kaj miloj da homoj, kiuj pereis sur la batalkampoj ; dum la malbonaj suverenoj pereigis la homojn centmilope kaj milionope.

La krista doktrino abolicias la leĝon "*Okulon pro okulo, denton pro dento*". Sed la homoj, kiuj ĉiam praktikis tiun leĝon kaj kiuj ankoraŭ hodiaŭ ĝin obeas, aplikas ĝin laŭ teruraj proporcioj, per izolitaj punadoj aŭ ekstermas unuj la aliajn en militoj, kaj postulas ne nur okulon pro okulo, sed, kvankam neprovokite, ordonas murdi

milojn da estuloj. Tiuj homoj ne rajtas indigni, ke oni siavice aplikas tiun leĝon al ili mem, kaj en tiel eta skalo, ke oni nombrus apenaŭ unu imperiestron aŭ reĝon el cent miloj, eble unu miliono da individuoj mortigitaj laŭ ilia ordono aŭ kun ilia konsento.

Ne indignu la suverenoj pro la murdoj al Aleksandro la II-a aŭ al Humberto, sed prefere miru, ke tiaj murdoj tiom maloftas kompare kun la konstanta kaj universala murd-ekzemplo, kiun donas la suverenoj mem.

La popolamasoj estas kvazaŭ hipnotigitaj: ili ne komprenas la signifon de kio okazas antaŭ ili. Ili ne vidas la reĝojn aŭ la prezidentojn senĉese okupatajn pri milita disciplino, revuoj, paradoj kaj manovroj, kiujn ili ĉeestas kaj pro kiuj ili vantigās. Homoj kure alsvarmas por vidi siajn fratojn, vestaĉitajn per multkoloraj kaj brilantaj vestaĵoj, transformitajn en maŝinojn kaj kiuj, laŭ tamburoj kaj trumpetoj kaj laŭ la komando, samtempe faras saman geston, ne komprenante ĝian signifon.

Tamen tiu signifo estas simpla kaj klara: ĝi estas nenio alia ol la preparado al murdo ; ĝi estas la brutigo de la homoj por fari el ili murdilojn.

Tio estas la plej ŝatata kaj vanta okupo de l'nuraj imperiestroj, reĝoj kaj prezidentoj. Nu,

estas ili, kiuj fariĝis murd-fakuloj, kiuj surhavas militistajn uniformojn kaj murdilojn, estas ili, kiuj indignas, kiam unu el ili oni mortigas!

Le reĝ-murdo, kia la tute freŝa kontraŭ la reĝo Humberto, ne teruras pro la krueleco de la fakto mem. La agoj, kiujn krimis en la pasinteco la reĝoj kaj la imperiestroj: tiel la Sankta Bartolomeo, la religi-militoj, la senkompata subpremo kontraŭ la kamparanaj ribeloj, kiel la nuntempaj registaraj ekzekutoj, la martirigo en la karceroj kaj la disciplin-rotoj, la pendumo, la gilotino, la dummilitaj pafado kaj buĉado, tiuj agoj ne povus pro sia krueleco esti komparataj kun la atencoj de la anarkiistoj.

La anarkiistaj krimoj ne estas teruraj ĝuste pro tio ke la viktimoj ne meritis sian sorton. Se Aleksandro la II-a aŭ Humberto ne meritis esti murditaj, la milojn da Rusoj, kiuj pereis ĉe Plevna, kaj da Italoj en Abisenio ankoraŭ malpli meritis tion.

Se la reĝ-murduloj agas pro influo de persona indigno naskita de la suferoj de subpremata popolo, pri kiuj ili juĝas kulpaj Aleksandron, Karnoton aŭ Humberton, aŭ se ili agas pro venĝemo, iliaj agoj, kiel ajn malmoralaj ili estas, tamen estas kompreneblaj. Sed leviĝas la demando: kial la anarkiistoj ne povas imagi ion pli bonan por plibonigi la popolsorton, ol murdi

homojn, kies malapero tiel vanas, kvazaŭ oni senkapigus tiun fabelan monstron, sur kiu nova kapo rekreskus ĉe loko de l'malnova?

Nu, ĉu utilas mortigi ilin?

Sufiĉus memori, ke la sama subpremo, la samaj militoj ĉiuepoke okazis, sub kiu ajn regnestro: Nikolao aŭ Aleksandro, Frederiko aŭ Vilhelmo, Napoleono aŭ Ludoviko, *Palmerston* aŭ *Gladstone*, *Mac Kinley* aŭ aliu ajn, kaj oni komprenus, ke tute ne estas tiu aŭ tiu ĉi estro la kaŭzo de l'plagoj, kiujn suferas la popoloj. Tiuj plagoj estas la konsekvenco de socia organizo tiel premanta ĉiujn socianojn, ke ĉiujn subjugigas nur kelkaj homoj, plejofte ununura. Ĉi-lastaj estas tiel perversigitaj pro sia monstra potenco, kiu metas sub ilian gvidadon la vivon de milionoj da individuoj, ke ili estas trafataj de megalomanio, kion oni ne ekvidas nur pro ilia alta socirango.

Tuj de sia naskiĝo ĝis la tombo, tiuj homoj estas ĉirkaŭitaj de senretena lukso kaj vivas en la ĝin akompananta etoso de mensogo kaj hipokrito. Ilia edukado, ilia tuta aktiveco havas ununuran celon: studadi kiamaniere okazis la murdoj en la pasinteco, la plej bonajn murdprocedojn nia-epokajn kaj prepari sin al tiuj murdoj. Ili daŭre surportas la ilojn de l'detruo: sabrojn kaj spadojn ; ili vestaĉas sin per ĉiuspecaj uniformoj, okazigas revuojn kaj paradojn, vizitas unu la

alian kaj interdonacas ordenojn aŭ milittitolojn ; kaj ne nur neniu kvalifikas per la vera vorto kion ili faras, nek diras, ke estas abomene kaj krime sin prepari al murdigo, sed krome ili kredas, ke estas la tuta popolo, kiu aprobas ilian konduton.

La nuraj gazetoj, kiujn ili legas kaj kiuj ŝajnas al ili la spegulo de l'sentoj de la tuta nacio aŭ de ties plej bonaj reprezentantoj, plej servile laŭdegas iliajn parolojn kaj agojn, kiel ajn stultaj kaj aĉaj tiuj estas.

Ilia ĉirkaŭularo, tiel viroj kiel virinoj, pastroj kaj laikoj, ĉiuj, por kiuj bagatelas la homa digno, vete klopodas kuraĝigi ilin per la plej subtila flatado, ilin trompi ne lasante al ili ekvidi la mensogon, kiu ĉirkaŭas ilian tutan ekziston. Cent jarojn ili povas vivi kaj tamen sen vidi ununuran reale liberan homon, neniam aŭdante la veron. Iafoje oni tremas pro abomeno, aŭskultante iliajn parolojn kaj vidante iliajn agojn ; sed se oni momente pripensas ilian situacion, oni komprenas, ke en samaj cirkonstancoj ĉiu ajn alia agus same. Prudentulo, kiu troviĝus en tia situacio, povus havi nur unu sintenon: foriri. Se li restus, li agus samkiel ili.

Efektive, oni demandas al si, kio devas okazi en la kapo de iu Vilhelmo – mense barita viro, mez- edukita, vanta, kaj kiel idealon nur tiun de germana junkro – kiam ĉiun el liaj stultaĵoj aŭ

malnoblaĵoj salutas iu entuziasma “hoch” kaj komentas la universala gazetaro kiel gravegan eventon? Se li diras, ke, ĉe gesto lia, liaj soldatoj devas mortigi eĉ siajn patrojn, oni krias “hura!”. Se li diras, ke oni disvastigu la Evangelion per frapoj de fergantita pugno: “hura!”. Ankoraŭ “hura!”, se li ordonas al la trupoj, kiujn li sendas al Ĉinio, neniun indulgi. Kaj, anstataŭ enfermi lin en pundomo, oni velas al Ĉinio por plenumi liajn ordonojn.

Aŭ jen Nikolao la II-a, kvankam nature modesta, kiu komencas sian regadon, deklarante al respektindaj plejaĝuloj, ke ilia deziro regi la proprajn aferojn laŭ propra plaĉo estas nur sen-senca revo. Kaj la gazetoj, kiujn li legas, la homoj, kiujn li vidas, aprobas lin kaj gloras liajn virtojn.

Li proponas projekton por universala mal-armado, infanecan kaj ridindan, kaj samtempe li plialtigas la nombron de siaj soldatoj ; tamen neelĉerpeblas la laŭdoj pri liaj saĝo kaj virtoj. Sen kialo kaj sen neceso li ofendas kaj martirigas tutan popolon, la Finlandan, kaj oni tamen ne malpli laŭdas lin. Fine li organizas sensencan buĉadon en Ĉinio, kaj tion kontraŭstare al sia propra projekto de universala paco ; tamen, oni el ĉie laŭdegas kaj liajn sangajn triumfojn kaj lian fidelecon al la pacpolitiko de lia patro.

Tial oni devas demandi al si, kio okazas en la

kapo kaj la koro de tiuj homoj?

Oni povas diri, ke la subpremado de l'popoloj kaj la maljuston de l'militoj kulpas nek la Aleksandroj, nek la Vilhelmoj, nek la Humbertoj, nek la Nikolaoj, kiuj organizas tiujn murdojn, sed ja tiuj, kiuj lokis ilin kaj plu tenas ilin en ilia pozicio de disdonantoj de la homa vivo.

*

Tial neniel utilas mortigi la Aleksandrojn, Nikolaojn, Vilhelmojn kaj Humbertojn. Simple oni ĉesu subteni la socian organizon, kiu naskas ilin. Nu, la nuna reĝimo konserviĝas nur dank'al la egoismo kaj la brutiĝo de l'homoj, kiuj forvendas sian liberon kaj sian dignon interŝanĝe de senvaloraj materiaj avantaĝoj.

Tiel kondukas la homoj troviĝantaj sur la mal-superaĵoj de la socia hierarkio, parte ĉar ilin brutigis fuŝedukado, parte pro sia persona intereso, sed profite al tiuj lokitaj ĉe supera ŝtupo. Sammaniere agas tiuj, kiuj troviĝas ĉe pli alta socigrado, pro la samaj kaŭzoj, cele al la samaj avantaĝoj, kaj profite al tiuj ankoraŭ pli alte lokitaj. Tiel oni atingas la plej altajn ŝtupojn de la hierarkio, ĝis la personoj – aŭ la persono – kiuj situas ĉe la supro de l'konuso kaj havas nenion plu akirotan ; por ĉi-lastaj la sola agmotivo estas la ambicio kaj la vantemo. Kaj ili estas tiel brut-

igitaj kaj koruptitaj pro sia senlima potenco kontraŭ siaj samuloj, pro la flatemo kaj la hipokriteco de sia ĉirkaŭantaro, ke, kvankam malbonagante, ili estas absolute konvinkitaj pri sia rolo de bonfaranto de l'homaro.

La nacioj, kiuj foroferas sian dignon profite al siaj materiaj interesoj, per tio mem naskas homojn, kiuj ne povas konduki aliel ol ili faras. Tamen tiuj nacioj ekkoleras kontraŭ la stultaj kaj malicaj agoj de la mastroj, kiujn ili mem trudas al si. Nu, puni ilin, tio signifas vipi infanojn, kiujn oni mem perversigis.

Do tre simpla la solvo. Por forigi la jugon, kiu pezas sur la popoloj, kaj la senutilajn militojn, por mutigi la indignon kontraŭ tiuj, kiuj ŝajnas kulpi tion, kaj por ke oni ĉesu mortigi ilin, malmulto sufiĉus: kompreni la aferojn tiaj, kiaj ili estas, nomi ilin per ties nomo, diri ke armita trupo estas murdilo, ke la organizado de armeo, tasko kiun tiel memfide prezidas la ŝtatestroj, estas la preparado al murdo.

Ĉiu imperiestro, reĝo aŭ respublikprezidento ekkonsciis, ke lia funkcio de armeestro estas neniel honordona, nek grava, kiel kredigas al li liaj korteganoj, sed male, malutila kaj hontinda; ĉiu honestulo komprenu, ke pagi la imposton dediĉitan al vivtenado kaj armado de la soldataro, kaj ankoraŭ pli, persone servi en la armeo,

konsistigas ne sensignifan agon, sed ja mal-moralan kaj hontindan, kaj tuj la arbitro de l'imperiestroj, reĝoj kaj prezidentoj, kiu tiom indignigas nin kaj estigas ilian murdon, mal-aperos per si mem.

Ne utilas do mortigi la Aleksandrojn, la Karnotojn, la Humbertojn kaj aliajn ; kio necesas, tio estas konvinki ilin, ke ili mem estas murdemuloj, sed ĉefe malpermesi al ili mortigi, aŭ rifuzi mortigi laŭ ilia ordono.

Se la homoj ankoraŭ ne tiel agas, tio estas simple ĉar la registaroj, movate de konservinstinkto, tenadas ilin en hipnota stato. Tial oni klopodu malebligi la murdojn, kiujn kulpas la ŝtatestroj, kaj ĉesigi la interpopolan buĉadon, ne per aliaj murdoj – ĉar, male, ili nur pliigus la hipnoton – sed per vekado, kiu detruos tiun hipnoton.

Tion mi provis fari en la ĉi-supra artikoleto.

Nikolao NEKRASOV

Fablo pri gilotin-ŝraŭbeto

Nikolao Nekrasov (1900-1938) estis grava esperantlingva poeto kaj tradukisto, tre aktiva en la SAT-movado, en la Sovetlanda Esperanto-Unio (SEU) kaj poste en IAREV (Internacia Asocio de Esperanto-Verkistoj), kiun li kunfondis. Li estis mortpafita pro tiuj aktivecoj, kiel multaj el siaj kamaradoj. La ĉi-suba fablo unuafoje aperis en la numero 5 (17) de Sennacieca Revuo, en februaro 1925.

Fablo pri gilotin-ŝraŭbeto

Sonante per terura muĝa knaro,
Tranĉante sen ripozo kaj sen laco,
Ĝi staris en la mezo de la placo,
Kaj ĉirkaŭ ĝi amasis urbanaro.
Po unu kun videblaj tim-esprimoj
Alvenigataj estis la viktimoj.

Jen unu preĝis, jen alia ploris,
Jen tiu estis malbenita akre,
Sed same, mortigante buĉ-masakre,
La gilotino siblis kaj stertoris.
Per malfacile ruliĝanta ĉenobloko
Levanta supren estis la tranĉilo
Kaj jen subite de la streĉobloko
Abrupte ĝi faladis kun ekbrilo.

En la amaso tra la placo tuta
En la fatal-momento ekzekuta
Ekkrio - "ha!" - trakuris iufoje
Kaj en mistero de silento muta
Jen iu orfe ĝemis plej malĝoje?

Simile al melonoj rikoltitaj
En korto kuŝis kapoj fortranĉitaj
Kaj sub la suno, radiantaj ride,
Indiferentaj, stultaj kaj malsprigitaj
Sur ili muŝoj rampis sang-avide.

Kaj same, ankaŭ sub la suno supra,
Brilante per ole-ŝmirita spino,
Plej gaje sidis eta ŝraŭbo kupra
ĉe iu bloko de la gilotino.
Pri tuta mondo ĝi nenion sciis,
Ĝi estis bona, bela kaj afabla
Kun maniero milda kaj agrabla
Sur sia loko lerte ĝi funkciis
Kaj pri funkcio sia ne konsciis.

Tre ofte, kiam la ŝraŭbeto bloka
Kapricis kaj obstinis iel sprite,
Ne plu laboris la tenilo hoka
Kaj lasis la tranĉilo kvazaŭ moka
Eĉ ies kapon nur duontranĉite.

Ekzekutisto devis tiukaze
Ekgrimpi al la ŝraŭbo por riparo
Kaj li klopodis tie plej emfaze
Konvinki ĝin pri urĝo de refaro.

Kaj la ŝraŭbeto jam en bon-humoro
Konsentis petoleme pri laboro -
Kaj ree fluis sango agonias,
Kaj regis la arbitro tirania...

Okazis tamen unu belan tagon:
Ekestis en la urbo tumultego,
Sur placo oni levis ruĝan flagon,
Kaj proklamita estis nova rego.
Kaj tut-simile, kiel ĵus pli frue
Verŝata estis sango larĝaflue,
Toronto da popol-amaso granda
Disverŝis sin tra la liberaj stratoj,
Kaj kun standardoj ruĝaj kaj plakatoj
Ĝi fluis kiel strio larĝrubanda.

Ŝanĝiĝis nun la ordonista rolo:
Komunavole sen diskuto
Al la tiranoj venĝis la popolo
Per gilotina ekzekuto.

La ŝraŭbo, kiun konis ni antaŭe,
Hodiaŭ agis hieraŭe:
Sen scio pri la diferencoj rangaj
Estante mem nur ero de detaloj,
Ĝi partoprenis en ekstermoj sangaj

De la antaŭaj moŝtoj longalangaj:
Nobeloj, mastroj, reĝoj, generaloj.

Sed kiam la popol-koleron pravan
Finfine anstataŭis indulgemo justa,
La ŝraŭbo ekrimarkis, ke jam rusta
Makulo kovras ĝian brilon ravan:
Ne plu bezona pro terur-teroro -
La gilotino staris sen laboro!

Kaj iutage, dum popola festo,
Simbole pri malnovo, kiu pasis,
Publike kun solena manifesto
Ĝin la popolo disfrakasis
Kaj ie kuŝi en polvaĉo lasis.

Per sola frapo trafa kaj subita
Ŝraŭbeto nia estis forskuita,
Kaj ofendite pri ĉi tia malafablo
Ĝi multe plendis pri la stato nemerita
Kaj longe kuŝis en malpura sablo -

Ĝis iu laborista helpobubo
Okaze ĝin retrovis en la rubo,
Ĝin alte suprenĵetis kaj rekaptis,
Purigi ĝin per forta froto provis,

Kaj poste - jam sur muelej-maŝino
Aŭ sur alia bona instrumento
Ŝraŭbeto mia sidis kun kontento,
Samkiel sur la fama gilotino.
Ĉe iu transmisio aŭ ĉe bloko
Perfekte ĝusta estis nova loko.

Kaj same - sub la suno bril-radia,
Ole-ŝmirita zorge per ŝmirilo,
Funkciis tute taŭge ŝraŭbo nia,
Sed jam ne por buĉado tirania,
Sed jam por la komuna bon-utilo...

Ho, vi, ŝraŭbetoj, multaj sen difino,
Partetoj de giganta mekanismo,
Nomata - "*la kapitalismo*",
Terura kaj fatala gilotino!
Vi, ĉiuj, en la mondo ĉiu subsuna,
Laŭ via eksterajaĵo - bel-aspektaj,
Laŭ la esenco - bonaj, eĉ perfektaj,
Pri vi ja temas en fabelo nuna.

Ho kiom mi vin ŝatas plej bonvole,
Se sidas vi sur la alia loko,
Sed? servas vi al premo kaj sufoko,
Eĉ - kvankam senkonscie kaj senvole.

Eĉ sendepende de kvalitoj viaj,
Reĝimon maljustegan vi subtenas
Kaj tial do per ĉiuj fibroj miaj
Mi vin malamas kaj malbenas.

Sed kiom ĝoje mi renkonti povus
Vin en alia pli feliĉa horo:
Ja ĉiuj taŭg-utilan lokon trovus
En nova regno - Regno de Laboro.

Paŭlo SIGNORET NE MORTIGU! (Dekalogo)

En 1980, okazis dum la SAT-Amikara kongreso en Bulonjo-ĉe-Marŝo debato pri mortopuno. Ĝin animis Paŭlo Signoret, surbaze de la stokholma deklario de Amnestio Internacia (1977), kies argumentaro parte estis reuzita en la argumenta parto de ĉi tiu libro. Tio ankaŭ estis inspirofonto por la ĉi suba dialogo, verkita iom poste.

“Juĝi, evidente, estas ne kompreni, ĉar se oni komprenus, tiam oni ne povus juĝi.”

André Malraux, *“Les conquérants”*

K. - Jen via gazeto, dankon! ... Ĉu vi legis? Terure, ĉu ne? Tiaj individuoj ja ne rajtas vivi. Sola la mortpuno decas por uloj, kiuj eĉ ne indas la nomon *“homo”*.

H. - ...

K. - Ĉu vi ne konsentas?

H. - Ne

K. - Kial do? Eble la krimo ŝajnas al vi ne sufiĉe abomena?

H. - Ĝi ja estas abomena. Kaj ĝi naŭzas min tiel same, kiel vin. Tamen mi ne konsentas, ke oni mortigu krimulon; kiel ajn nehoma estas la riproĉata krimo.

K. - Ĉu vere? Mi volonte aŭdus viajn argumentojn. Kaj mi avertas vin; ili estu solidaj, ĉar ne facile vi konvinkos min!

H. - Unue, kiu povas certigi, ke krimis efektive li, ne aliulo? Ĉu vi neniam aŭdis pri juĝeraroj? Ĉu vi ne timas, ke oni mortigu senkulpulon?

K. - Pa, pa! Maloftegaj estas tiaj aferoj!

H. - Pli oftaj ol vi supozas! Jen cifero: de la komenco de la nuna jarcento, en Usono, estis punmortigitaj 23 personoj, kiujn postaj esploroj montris senkulpaj. Dudek tri senkulpuloj! Sed kiom da

juĝeraroj restas nemalkovritaj?

K. - Bedaŭrindaĵoj! Eraro estas homa... Tamen ne dubeblas, ke nun la leĝoj garantias maksimuman defendrajton al ĉiu akuzito, ke la procesoj estas justaj... kaj findinda la justico.

H. - Kiel optimisma vi estas! Pli ol la profesiaj juristoj mem, kiuj opinias, ke el ĉiuj punoj la mortpuno estas proable tiu, kiu plej maljuste frapas. Veras viaj asertoj sole en landoj – malmultaj -, kie leĝaj garantioj funkcias. Kaj tamen, eĉ tie, la homoj ne estas egalaj antaŭ la kortumoj. Ekzemple en Usono nigrhaŭtulo havas kvaroble pli multe da ŝancoj esti mortkondamnita ol blankulo eĉ sama akuzo. Krome, riĉa akuzito povas elekti sian defendanton el inter la plej lertaj advokatoj, dum al malriĉa estos altrudita senpage oficanta debutanto, ofte sensperta pri kriminala juro, ne kapabla konvene pledi en tia komplika proceduro, kian necesigas kriminala proceso, kies fina verdikto povas esti mortpuno. Ĉu vi do konsentas, ke haŭta koloro aŭ financa bonstato de akuzito ludu decidan rolon en tio, ĉu oni mortigos lin aŭ ĉu li plu vivos? Ĉu tion oni nomu fidinda justico... aŭ horora loterio?

K. - Vi intence malklarigas tre simplajn aferojn. Mi ne lasos min impliki en tiaj subtilaĵoj. Por puni murdinton tiel, ke li ne plu havos okazon rekomenci, ĉu necesas tiom da komplikaĵoj?

H. - Malofte la vero estas simpla. Kaj vi estas vere imagomanka: se morgaŭ tiu akuzito, preskaŭ sola kaj senhelpa antaŭ la timiga jutica aparato, estos vi mem, tiam vi eble konsideros ne tiel balastaj la jurajn barilojn metitajn de la leĝaro por plejeble eviti, ke senkulpulo leĝe estu murdita. Puno senrevena, absoluta, definitiva, kia estas mortpuno estus pravigebla nur sub du kondiĉoj: unue, ke absolute certaj estu la kulpeco kaj respondeco de la kondamnito. Nenie ekzistas tia justicosistemo, kia povas garantii tion. Due, ke ĉiuj juĝatoj estu strikte egalaj antaŭ ia puno. Ankaŭ tia egaleco neniam atingeblas. Justico verdiktas laŭ deklaroj de eraremaj atestantoj, laŭ konstatoj de eraremaj ekspertizistoj, laŭ intima konvinko de antaŭjuĝemaj kaj trompiĝemaj ĵurianoj, laŭ juraj kapabloj de nur homaj juĝistoj. Kaj vi trovas normala, ke en tiaj kondiĉoj ĝi arogus al si la rajton senigi homon je vivo! Ne, milfoje ne!

K. - Bone! Do, laŭ vi, ĉar ne eblas juĝi senerare, ni simple lasu la krimulojn krimi... kaj la honestulojn viktimiĝi.

H. - Tion mi ne diras. Ke socio difinu regulojn por ordigi la rilatojn inter siaj anoj, kaj ke ĝi sankciu ties malobeojn estas neceseco - eble ne entuziasmiga sed verŝajne deviga en la nuna stato de la homaro. Tamen justico relativa devas rifuzi rimedojn absolutajn, justico erarema devas

konservi la eblon ripari.

K. - Sed vi ne povas nei, ke ekzekuto de krimulo instigas eventualajn krimontojn - aŭ krimuntojn - al saĝiga pripensado.

H. - Mi ne nur tion neas, sed ankaŭ povas pravigi mian malkonsenton: ĉiuj seriozaj enketoj faritaj en la tuta mondo sub la aŭspicioj de Unuiĝintaj Nacioj kaj science kondukitaĵoj bazitaj sur ties rezultoj klare kaj nekontesteble montras, unue, ke mortpuno ne havas malinstingan efikon; due, ke interrompo en la apliko de mortopuno en iu lando nepre ne kuntrenas plialtiĝon de la nombro de krimoj en tiu landa. Pri tio nun neniu plu rajtas dubi: ekzemplodoneco de mortpuno estas simple mito. Alivorte mortpuno havas nenian ekzemplan utilon. Inter la du mondmilitoj, angla esploristo sisteme demandis pendumotajn mortkondamnitajn: ĉiu el ili iam en sia vivo estis ĉeestanta pendumon. Tio neniel malinstigis ilin siavice krimi.

K. - Mi apenaŭ povas kredi vin. Kial la timo surgrimpigi eŝafodon ne povas retenigi normalan homon antaŭ gesto fatala?

H. - Ĝuste tial, ke krimulo estas - momente aŭ konstante - nenormalulo. Li estas aŭ mensdebla, aŭ freneza, aŭ blindigita de pasio, ĉiel nekapabla racie pensi. Kredi, ke en la momento de krima ago la penso pri puno povas retenigi la manon,

estas ideo de homo normala, sana, ekvilibra. Dum la Mezepoko, en Eŭropo, pendumitoj sekigis ĉe pendoj, en ĉiu vojforko. Tio, laŭ via hipotezo, estus devinta malaperigi la krimajn farojn. Nu, kiel sciante, Mezepoko estas unu el la historiaj periodoj plej riĉaj je murdoj kaj kruelegaĵoj. K. - Bone! Eĉ se mi konsentus, ke mortpuna perspektivo ne sufiĉas por malinstigi homon murdi, restas tamen, ke mortinta murdinto ne plu mortigos. Mortpuno eble ne havas pedagogian valoron, sed profilaktikan ĝi ja havas: ĝi radikale preventas pliajn krimojn. Ekzekutito ne rekomencos, ĉu ne vere?

H. - Prave! Krom ke ekzekutito povas esti senkulpulo - kiel jam dirite - , senkulpulo, kiu neniam "*komencis*"... Sed ni lasu tion. Al via propono radikale "*solvi*" la problemon de tio, kion oni nomu krima refalo, mi faros du respondojn. Unue, statistikoj pruvas, ke post liberiĝo tre malalta procento de la murdintoj krimas denove. El inter 2 646 murdintoj liberigitaj en 12 ŝtatoj de Usono, de 1900 ĝis 1976, nur 16, t.e. 0,6% estis kondamnitaj pro nova krimo.

K. - Eble mialmulte, sed tamen jam tro! Ĉu la 16 viktimoj devas fieri, ke ili konsistigas tiel malaltan procenton?

H. - Ĉiu fakto havas du vizaĝojn: mi preferas ĝoji je la konstato, ke 99,4 % de la murdintoj ne

refalis. Tio cetere kondukas min al la dua respondo: se, je la nomo de ia sekuriga - aŭ, kiel vi mem diris, profilaktika - postulo vi admonas socion, ke ĝi ekzekutu la krimulojn, tiam vi devas postuli multajn aliajn ekzekutojn: furiozfrenezuloj, maljunuloj riskantaj senilan demencon, mortebriaj aŭtostirantoj, 'frenezuloj de la stirrado', kokainvendistoj, ĉasistoj, jen estas kategorioj de potencialaj murdontoj, kiuj statistikateste mortigas multe pli ol murdintoj! Ĉu vi pretas 'profilaktike' mortigi ilin ĉiujn? Aŭ prefere vi konfesu, ke socio, kie regus absoluta sekureco estas nur utopiaĵo, ke elimini kelke da murdintoj - aŭ senkulpuloj! - estas iluzia kuracilo. Eble ekzistas socia profilaktiko; se jes, ĝi kuŝas aliloke.

K. - Se kredi vian argumentadon, mortpuno ne malinstigas krimontojn, ĝi estas senpova en prevento de krimoj, ĝi estas senutila, danĝera, malegaleca. Tamen por krimoj plej nehomaj, simpla sento pri justeco postulas justan sankcion, kaj la sola deca puno estas laŭ mi - kaj laŭ ne nur mi! - la morto. Tio estas nerefutebla morala postulo.

H. - Mi ne konsentas! Neniu krimo, kiel ajn abomeninda ĝi estas, pravigas la aplikon de kruela kaj nehoma puno. La nuntempaj konceptoj pri justo malakceptigas la ideon, ke justa puno konsistu ĝuste en la ripeto far la socio de tiaj agoj, kiujn kondamnas tiu socio ĉe krimuloj. La praa leĝo de egala repago, "*okulon pro okulo, denton*

pro dento”, vivon pro vivo, prezentas ne justecon sed ja leĝan venĝon. Ĝi regresigas la homaron al antaŭjarmila primitiveco. Alivesti antikvan moron per novaj vortoj: justa puno, kosto de la kulpo, elaĉeto, ktp... ne ŝanĝas la fundon de la afero. Ĉu forpreni la vivon de murdinto redonas la vivon al murdito? Ĉu decas respondi al murdo per alia murdo? Socio, kiu faras al individuo ĝuste tion, kion ĝi riproĉas al li, senigas sin je la rajto nomi sin humana; murdante la murdinton ĝi alniveligas sin al li kaj ne plu rajtas lin mallaŭdi kaj juĝi. Leĝa perforto repondas al unuopula perforto sub la tre oportuna kovro de ŝtata racio. Plie, dum individuo, kiu murdas, havas ofte tiun indulgigan cirkonstancon, ke tiam lin regas portempa aŭ daŭra frenezeco, pasio, timo aŭ blinda kolero, la ŝtata punmaŝino male murdas ĉiam flegme kaj plenkonscie.

K. - Ĝuste ĉar justico devas esti senpartia, ĝi verdiktas nur post longa esploro kaj pripenso. Kion riproĉindan vi trovas en tio?

H. - Des pli grava iĝas murdo se antaŭpensita, egale ĉu ĝin kulpas individuo aŭ kolektivo. Socio murdu por sin defendi, konsentite! Sed tiam ĝi ne arogu paradi sub lilia mantelo de virto! Kion moralan vi trovas en tio? Tiom pli ke mortpuna perforto naskas venĝan perforton, kaj tial kontribuas pluteni la socion, kiu ĝin uzas, en senlira infera cirklo: mortpuno propre estas

krimiga. Bela atingo, ĉu ne vere, por institucio, kies apogantoj kaj zelotoj pretendas, ke ĝi estas kontraŭkrima panaceo.

K. - Vi lerte paradoksumas. Sed ĝis nun tiaj argumentoj videble konvinkis nemultajn registojn en la mondo. Miascie, plejparte el la ŝtatoj - kaj notinde inter ili, la superŝtatoj - konservas la morpunon en sia leĝaro kaj ne montras emon ĝin rezigni. Eĉ pli! Kelkaj, kiuj iam konsentis aboli ĝin, nuligis sian decidon.

H. - Nomi ĝenajn veraĵojn paradoksoj ne sufiĉas por ilin refuti. Koncerne la ŝtatojn - kiuj estas, laŭ fama difino, malvarmaj monstroj - ili fajfas pri moralo kaj homaj rajtoj, kaj kondutas sole laŭ propra intereso. Interalie, ili konsideras sia interesa havi la eblon sufoki ribelon, subpremi opinion, reordigi malordon, eventuale elimini rivalon. Kaj par tio perfekte taŭgas mortpuno: ne mirige, ke ili ne emas foroferi tiel idealan regilon. Je la nomu de iu supercelo, ili ekzekutigas kelkajn individuojn perfere ol lasi perturbon invadi la tutan landon. Aparte celataj estas la politikaj opoziciuloj, sindikatisoj, kuturmovadanoj, k.a., kies agado pli ĝenas registaron ol faroj de krudaj banditoj. Tial la monda organizaĵo Amnestio Internacia, konsciante ke en lando kie ekzistas la mortpuno, tie la opinimalliberuloj estas ĉiuj en vivdanĝero, difinis kiel unu el siaj celoj ĝian abolon, ĉiuokaze kaj ĉie.

K. - Vi ŝajne forgesas, ke ne nur registoj apogas la mortpunon. Opinisondoj montras, ke ankaŭ plimulto el simplaj civitanoj aprobas ĝin kaj mal-konsentas ĝian abolon.

H. - Opinisondoj montras ankaŭ, ke, el tiu plimulto, la duono pretas ŝanĝi sian opinion, se estos proponita tia anstataŭa puno, kia ekzemple vivodaŭra enkarcerigo de la danĝeraj krimuloj. Cetere pri tiu problemo malmulte zorgas la homoj en landoj el la tiel nomata “*Tria Mondo*”, kie pli urĝe solvendaj malfacilaĵoj prioritare sorbas ĉies fortojn. Tie publikajn opiniojn influas favore al pluigo de la mortpuno multaj registaroj, por kiuj forofero de “*propekaj kaproj*”, zorge elektitaj el la plej minoritataj, plej mizeraj, plej senhelpaj socitavoloj pli facilas ol lukto kontraŭ la krimecon per alfronto de ties socikulturaj kaj ekonomiaj kaŭzoj. Jardekoj pasos, ĝis estos universale agnoskitaj la rajto por ĉiu homo ne esti submetita al kruela, nehoma kaj sendigniga puno, la rajto de ĉiu homo al vivo.

K. - Mi volonte respondus al vi per la konata rebato de Alfonso Karr: “*Ni abolu la mortpunon, konsentite! Sed tion iniciatu la sinjoroj murdistoj mem!*”

H. - Ha ve! vi ne eliras el trosimpligaj rezonoj. Kaj la homaro neniam eliros el sia sanga karuselo, se senfine murdo devas sekvi murdon. Kapablas

rompi la fatalon ne la individuo, malforta, elmetata al ĉiuj vivrisko kaj pasioj, sed la socia kolektivo, riĉa je senkompare pli grandaj eblecoj. Ĉiel - kaj tio estas mia lasta vorto - eĉ se vi sukcesus demonstri, ke la mortpuno konsistigas la miraklan solvan al ĉiuj sociaj malordoj, mi tamen ĝin rifuzus, ĉar ĝi estas rimedo, kiun neniu registara rajtas uzi por protekti la socion, tial ke ĝin uzante oni detruas la valorojn mem, kiuj igas socion inda je protektado.

K. - Kvankam vi lerte pledis, frato, vi ne sukcesis tute konvinki min. Tamen mi havis plezuron argumenti kun vi, kaj mi ŝatus koni vian nomon, ĉar mi havas tian impreson, kvazaŭ mi delonge konus vin. Kiel oni vin nomas?

H. - Mia nomo estas Habelo. Kaj la via?

Dua parto

**VOĈOJ DE
MORTKONDAMNITOJ
KAJ DE VIKTIMOPARENCOJ**

Deklaro de Ravaŝolo

(malpermesita dum lia proceso)

Francisko Klaŭdio Kenigstejno (Kœnigstein), alinome Ravaŝolo (tio fakte estis la fraŭlina nomo de lia patrino), naskiĝis la 14an de oktobro 1859 en Sankta Ĉamondo (Luarlando, Francio), en malriĉega familio. Li iĝis anarĥiisto, opiniante ke la origino de la mizero kaj de la sociaj malegalecoj troviĝas en la bazoj mem de la kapitalista socio. Rifuzante sian sorton, li iom post iom komencis priŝteli riĉulojn, unue senperforte, poste kun murdoj. Skandalita de maljusta kondamno kontraŭ anarĥiistaj aktivuloj, sekve de iu manifestacio, li eksplodigis per dinamito la loĝejon de ilia juĝisto en marto 1892, kaj poste tiun de lia anstataŭanto. Rekonita en Pariza kafejo, li unue estis kondamnita al dumviva punlaborado pro siaj atencoj, la 26an de aprilo 1892, kaj poste, la 21an de junio, estis kondamnita al morto pro murdado. Li estis gilotinita en Montbrizonon (Montbrison) la 11an de julio 1892.

La ĉi suban tekston skribis Ravaŝolo por esprimiĝi dum sia proceso, la 21an de junio 1892. Ŝajnas, ke oni ne ebligis tion al li. La tekston esperantigis Vinko Markovo.

Se mi ekparolas, tio ne estas por defendi min kontraŭ la agoj, pri kiuj mi estas akuzita, ĉar nur la socio, kiu per sia organizo metas la homojn en konstanta batalo unuj kontraŭ la aliaj estas respondeca. Efektive, ĉu oni ne vidas hodiaŭ en ĉiuj klasoj kaj ĉe ĉiuj postenoj personojn, kiuj deziras, mi ne diros la morton, ĉar tio malagrabla tiklas la orelon, sed malbonaĵojn por siaj samuloj, se tio povas doni al ili kelkajn avantaĝojn? Ekzemple: ĉu mastro ne deziras la malaperon de konkurenculo; ĉu la komercistoj ĝenerale ne ŝatus, kaj tio reciproke, esti la nuraj kiuj ĝuos la avantaĝojn de ĉi tiu okupo? Ĉu la senlabora manlaboristo ne deziras, por ricevi laboron, ke tiu, kiu havas postenon, estu elĵetita pro ajna motivo el la metiejo? Do, en socio, kie similaj faktoj okazas, oni ne estu surprizita de agoj el la speco de tiuj, kiujn oni riproĉas al mi. Ili estas nur logika konsekvenco de la batalo por la vivo inter homoj kiuj, por vivi, estas devigataj uzi ajnajn rimedojn. Kaj, ĉar ĉiu agas por si mem, ĉu la mizerulo ne estas devigita pensi:

Do, se tiel estas, mi ne hezitu, kiam mi malsatas, ekuzi la rimedojn kiuj troviĝas je mia dispono, eĉ se tio riskas viktimitigi iujn!

Ĉu la mastroj, kiam ili maldungas la laboristojn, zorgas ĉu tiuj ĉi ne malsatmortos? Ĉu tiuj, kiuj ĝuas superfluaĵojn zorgas ĉu al iuj mankas la necesajoj?

Ja ekzistas kelkaj homoj, kiuj estas helpemaj, sed ili estas senpovaj por helpi ĉiujn mizerulojn, kiuj baldaŭ mortos pro ĉiuspecaj mankoj, aŭ vole per ĉiaspecaj memmortigoj por ĉesigi mizeran ekzistadon kaj ne devi elteni la streĉojn de la malsato, la nenombreblajn hontojn kaj la humiligojn, kaj sen espero vidi ilin fini.

Tial, jen la familio Hajemo kaj la virino Suheno, kiu mortigis siajn infanojn por ne plu vidi ilin suferi, kaj jen ĉiuj virinoj, kiuj, pro la timo ne povi nutri infanon, ne hezitas endanĝerigi sian sanon kaj sian vivon detruante en sia sino la frukton de siaj amaventuroj. Kaj ĉiuj tiuj aferoj okazas meze de la abundeco de ĉiuspecaj produktoj! Oni komprenus, ke tio okazas en lando kie la produktoj maloftas, kie homoj malsatmortas.

Sed en Francio, kie regas abundeco, kie la viando-vendejoj plenplenas, kie pano plenigas la bakejojn, kie la vestaĵoj, la ŝuoj amasiĝas en la butikoj, kie troviĝas neokupataj loĝejoj!

Kiel agnoski, ke ĉio glatas en la socio, kiam la malo vidiĝas tiel klare?

Ja ekzistas homoj, kiuj kompatos ĉiujn tiujn viktimojn, sed diros al vi, ke ili estas senpovaj.

Ĉiu elturniĝu tiel, kiel li povas!

Kion povas fari tiu, al kiu mankas necesaj

kiam li laboras, se li subite iĝas senlabora? Li nur lasu sin malsatmorti. Tiam oni eldiros kelkajn kompatajn vortojn pri lia kadavro. Tion mi deziris lasi al aliuloj. Mi preferis iĝi kontra-bandisto, monfalsisto, ŝtelisto, krimulo kaj murdisto. Mi povus almozpeti: tio estas senhonoriga, malkuraĝa, kaj eĉ estas punita de viaj leĝoj, kiuj krimigas la mizeron. Se ĉiuj mizeruloj, anstataŭ atendi, servus sin tie, kie tio eblas, per ajnaj rimedoj, la kontentuloj eble pli rapide komprenus, ke estas danĝere eternigi la aktualan socian staton, kie la timo estas konstanta kaj la vivo ĉiam minacata.

Oni verŝajne pli rapide komprenos, ke la anarĥiistoj pravas kiam ili diras, ke por havi moralan kaj fizikan trankvilon, necesas detru la kaŭzojn, kiuj kreas la krimojn kaj la krimulojn: tion oni ne atingos per malaperigo de tiu, kiu, anstataŭ mortadi malrapide pro diversaj mankoj kiujn li spertis kaj devus elteni, sen espero vidi ilin fini, preferas, se li havas ioman energion, preni perforte tion, kio povas certigi lian bonfarton, eĉ riskante la morton, kiu nur povas esti la fino de liaj suferoj. Jen kial mi plenumis la agojn, kiujn oni riproĉas al mi, kaj kiuj nur estas la logika konsekvenco de la barbara stato de socio, kiu nur kreskigas la nombron de siaj viktimoj per la rigoreco de siaj leĝoj, kiuj punas

la konsekvencojn sen neniam ataki la kaŭzojn; oni diras, ke necesas esti kruela por mortigi sian samulon, sed tiuj, kiuj tiel parolas, ne vidas, ke tion oni akceptas nur por eviti propran pereon.

Same vi, sinjoroj juĝistoj, kiuj verŝajne kondamnos min je mortopuno, ĉar vi kredos, ke tio estas necesaĵo, kaj ke mia malapero kontentigos vin, kiuj abomenas la fluadon de homa sango, sed kiuj, kiam vi opinios ke utilas ĝin verŝi por certigi la sekurecon de via ekzisto, ne hezitos pli ol mi por tion fari, kun tiu diferenco, ke vi tion faros sen endanĝeriĝi, dum male, mi agis riskante mian vivon kaj mian liberecon.

Do, sinjoroj, ne plu estas juĝendaj krimuloj, sed krimkaŭzoj detruendaj. Kreante la artikolojn de la Kodo, la juristoj forgesis, ke ili ne atakas la kaŭzojn sed simple la konsekvencojn, kaj ke ili tiel neniel detruas la krimadon; vere, dum ekzistos la kaŭzoj, ĉiam sekvos la konsekvencoj. Ĉiam ekzistos krimuloj, ĉar hodiaŭ vi detruas unu el ili, kaj morgaŭ dek aliaj naskiĝos. Kio do necesas? Detru la mizeron, tiun fonton de krimoj, certigante al ĉiuj la kontentigon de siaj bezonoj! Kaj kiel facile tio estas realigebla! Sufiĉus konstrui la socion sur novaj bazoj, laŭ kiuj ĉio estus komuna, kaj laŭ kiuj ĉiu, produktante laŭ siaj kapabloj kaj fortoj, rajtus konsumi laŭ siaj bezonoj.

Tiam oni ne plu vidas homojn kiel la ermiton

de Nia-Damo-de-Graco kaj aliajn almozpeti por metalaĵo, kies viktimoj kaj sklavoĵoj ili iĝas! Oni ne plu vidas la virinojn cedi siajn allogaĵojn, kiel banalan varon, interŝanĝe kun tiu sama metalo, kiu tiom ofte malebligas al ni ekvidi ĉu la korinklino estas vere sincera. Oni ne plu vidas homojn kiel Pranzinio, Prado, Berlano, Anastajo kaj aliaj, kiuj, por ĉiam havi pli da tiu metalo, iĝis eĉ murdistoj! Tio klare montras, ke la kaŭzo de ĉiuj krimoj estas ĉiam la sama kaj ke necesas esti vere stulta por ne vidi ĝin.

Jes, mi tion ripetas: la krimulojn faras la socio, kaj vi, juĝistoj, anstataŭ kondamni ilin, vi devus uzi vian inteligentecon kaj viajn fortojn por transformi la socion. Samtempe vi forigus ĉiujn krimojn; kaj via verko, atakante la kaŭzojn, estus pli granda kaj pli fruktodona ol via justico, kiu malnobliĝas punante la konsekvencojn.

Mi estas nur malklera laboristo; sed ĉar mi spertis la vivon de la mizeruloj, mi sentas pli bone ol riĉa burĝo la maljustecon de viaj subpremaj leĝoj. El kie vi ĉerpis la rajton murdi aŭ enkarcerigi homon, kiu, alveninta sur la tero por vivi, estis devigita preni tion, kio mankis al li por nutri sin? Mi laboris por vivi kaj viviĝi miajn familianojn; dum mi kaj miaj familianoj ne tro suferis, mi restis "*honestaj*", laŭ viaj kriterioj. Poste mankis la laboro, kaj kun la senlaboreco venis la

malsato. Tiam, tiu granda naturleĝo, tiu ordonema voĉo kiu ne akceptas rebaton, la savinstinkto, puŝis min al kelkaj el la krimoj kaj deliktoj, kiujn vi riproĉas al mi, kaj kies aŭtorecon mi agnoskas.

Juĝu min, sinjoroj juĝistoj, sed se vi komprenis min, juĝante min vi juĝas ĉiujn kompatindulojn, kiujn la mizero, aliancita kun natura fiereco, igis krimuloj, dum riĉeco kaj bonfarto igus ilin honestuloj! Inteligenta socio igus ilin ordinaruloj!

Letero de Sako(Sacco) el la malliberejo

Nikolao Sako (Sacco, 1891-1927) kaj Bartolomeo Vanceti (Vanzetti, 1888-1927) estis italdevenaj laboristoj kaj anarĥiistaj aktivuloj, kiuj estis akuzitaj pro duobla murdo kaj kondamnitaj al morto de la Masaŝuseca kortumo post cinike maljusta proceso. Malgraŭ impona mondskala kampanjo favore al ilia liberigo, ili estis ekzekutitaj per elektra seĝo dum la nokto de la 22a ĝis la 23a de aŭgusto 1927, kaj postmorte rehonorigitaj 50 jarojn poste.

La esperanta versio de tiu-ĉi letero de Sako al sia amikino aperis en Sennaciulo la 20an de aŭgusto 1931, en traduko de k-do 17 117, kun ĉirkaŭaj komentoj.

La 23-an de aŭgusto estas la kvara datreveno de la juĝista krimo, per kiu viktimo falis Sako kaj Vanceti, la du K-doj elturmentitaj dum sep jaroj en usona karcero, ankaŭ ol ili estis ekzekutataj sur la elektra seĝo. Tago de honto k malhonorego en la homara historio, memoro alarmvekanta niajn ribelajn sentojn kontraŭ la maljustega nuna sociordo!

Ni presigas ĉi tie unu el la simplaj kaj kortuŝaj leteroj, kiujn sendis Sako el la karcera izolo en la eksteran mondon.

Kara amikino Ĵak!

Ĉiuvespere, kiam oni forprenas la lumigilon, mi promenas longtempe kaj mi vere ne scias, kiom da horoj mi ĉirkaŭkuras, ĉar mi forgesas ofte iri por dormi. Mi iras, iras senĉese kaj nombras 1, 2, 3, 4 paŝojn, returnas min kaj nombras denove unu-du-tri-kvar kaj tiel ĉiam plu. Dum tiu tempo mia kapo estas plena de fantazioj. Miaj plej belaj rememoroj maldormiĝas, kiam mi tiel iradas kaj meditas. Kelkfoje mi haltas ĉe la fenestro de mia ĉelo kaj tra la malgajaj kradoj mi vidas la naturon dum la krepusko kaj la stelojn sur la bela blua ĉielo. Lastan nokton la steloj estis pli lumantaj kaj la ĉielo estis pli blua ol iam.

Kiam mi ekvidis tion, mi memoris pri la okazintaĵoj el mia junaĝo kaj mi intencis, kiam mateniĝos, skribi al mia kara amikino ĉi tiujn pensojn.

La floroj, kiujn vi sendis al mi dum la antaŭa semajno, vekis miajn junaĝajn memorojn. Antaŭ dek ses jaroj, dum la aŭtuno, mi vidis lastfoje la vinberejon de mia patro. Ĉiu aŭtune, kiam la rikolto estis preta, mi devis gardi eĉ nokte, ĉar proksime ĉirkaŭ nia vinberĝardeno estis grandaj herbejoj, kie multaj bestoj sin paŝtis. Plej ofte mi dormis tie, por gardi la brutojn. La malgranda urbo Toremagiore ne estas malproksima de tiu loko. Matene kaj vespere mi iris tien kaj alportis du grandajn korbojn plenajn de legomo kaj fruktaro, kaj grandan bukedon por mia kara malriĉa patrino. La loko, kie mi dormis, estis malgranda veturilejo konstruita de mia patro, frato kaj mi. Ĉirkaŭ la veturilejo kreskis multaj plantoj kaj floroj, sed ne kreskis ruĝaj rozoj. Estis tre malfacile trovi belajn ruĝajn rozojn kaj mi amegas ilin. Proksime de nia vinberejo ni posedis grandan kampon kaj mi plantis legomon. Matene, pli frue ol la suno leviĝis, kaj vespere post la sunsubiro, mi iris aspergi ĉiujn florojn, legomojn kaj fruktarbetojn. Akurate, kiam la suno leviĝis, mi finis kaj tiam mi saltis sur la putomuron por vidi la grandiozan sunon brilantan;

mi ne scias kiel longe mi restis por rigardi ĉi tiun belegan vidaĵon. Se mi estus poeto, mi sciis priskribi la ruĝajn radiojn de l'kara suno, la bril-
etantan bluan ĉielon; la bonodoron de l'floroj kaj la kantadon de la birdoj. Estis feliĉego.

Tiam, post ĉi tiu ĝojego mi komencis ree labori, kantis unu el miaj plej belaj kantoj kaj dum mia kantado mi plenigis la korbon per fruktoj kaj kolektis florojn, formis ilin je bukedo. En la mezon de l'bukedo mi metis belan ruĝan rozon, kiun mi alportis el la malproksimo- unu el la ruĝaj rozoj, kiujn mi ĉiam serĉis kaj kiujn mi tiel volonte emis eltrovi - la veran ruĝan rozon.

*Ĉu homo, kiu skribis tian leteron,
povis esti fi homo?
- Ne, neniam!
Sed tiuj, kiuj lin mortigaĉis!*

Letero al ĉiuj miaj amikoj

Julos Beaucarne (nask. 1936) estas belga poeto, konata pro siaj revemaj kaj ekologiemaj tekstoj (legeblaj franclingve ĉe: www.julos.be). En februaro 1975, lia edzino estis murdita. La ĉi-suba teksto, kiun li verkis tuj poste, atestas pri lia rifuzo postuli mortopunon por la krimulo, malgraŭ la abomeneco de la situacio.

La tekston esperantigis Robin Beteau.

Foriĝis Lunjo mia al la dekor-reversa mondo, viro ŝian mildan haŭton per 9 ponardobatoj borus. Estas ja la socio malsana, ĝin ni devas reordigi kaj -ortigi per amo kaj persvado. Jen la historio de mia amatinet' haltigita rande de ties 33-a jaro. Nek vi nek mi senkuraĝiĝu. Mi daŭrigos mian vivon kaj miajn vojaĝojn kun tiu portenda ŝarĝo kaj kun niaj du karuletoj, kiuj al ŝi similas. Sen ordoni al vi, mi petas vin, ke pli ol iam ajn vi amu viajn proksimulojn. La mondo estas trista fivivejo, la puraj koroj devas kuniĝi por ĝin beligi, endas kulturi la homan animon. Mi restos por deĵori, mi restos ĝardenisto, mi kultivos miajn vorto-plantojn. Pere de miaj diroj, vi retrovos mian amatinon, veras nur amikeco kaj amo. Mi nun estas tre profunde en la korbo de malĝojoj. Onidire, ni devas manĝi po unu sakon da karbo por aliri paradizon. Ho! Kiom multe mi ŝatus, ke estu iu paradizo, kiom milda estus la rekuniĝo. Dume, al vi miaj ĉi-mondaj amikoj, aplombas mi - nur histriono, tabul-tretanto, komedi-ludanto faranta el vento revon -, aplombas mi leteri al vi por diri, kion mi hodiaŭ pensas: per ĉiuj fortoj miaj, mi pensas, ke endas ami ĉiel-ajne.

Julos Beaucarne

Nokton de la 2a ĝis la 3a de februaro 75.

“Mi denove estis batita en la enirejo de la hospitalo.”

Deklaro de Mumia Abu-Jamal

Mumia Abu-Jamal (nask. 1954) estas nigrula ĵurnalisto, eksa ano de la movado “Nigraj Pantheroj” (Black Panther) kaptita en 1981, kaj akuzita pro “mortigo de policisto”. Li estas kondamnita al morto post maljusta proceso. La jena deklaro estis publikigita post kiam Mumia decidis ŝanĝi siajn advokatojn. Ĝi, same kiel la sekva artikolo, aperis en la retejo de la Komitato por Subteno al Afrikaj Malliberuloj (COSIMAPP, <http://mumia.samizdat.net/cosimapp/somcosimapp.htm>), en traduko de Platano.

Jura deklaro de la 3a de Majo 2001, el mortohalo.

Mi, MUMIA ABU-JAMAL, deklaras ke:

1. Mi estas demandanto en tiu proceduro “*Habeas Corpus*”. Se vokota kiel atestanto, mi atestus la sekvanton laŭ mia persona scio.

2. Mi ne pafis al la policisto *Daniel Faulkner*. Mi tute ne involviĝis en mortigo de *Daniel Faulkner*. Mi estas senkulpa.

3. Dum mia proceso, oni ne donis al mi la rajton reprezenti min mem; mi neniel fidis la advokaton kaj li neniam petis nomita de la kortumo, kiu eĉ ne demandis al mi kio okazis tiun nokton kiam oni pafis min kaj la policano estis mortigita, kaj mi ne rajtis ĉeesti dum almenaŭ duono de la proceso.

4. Ĉar mi estis senigita de ĉiuj miaj rajtoj dum mia proceso, mi ne atestis. Mi ne volis esti peono en tiu maskerado, kiu povus doni impreson ke mia proceso estas justa. Mi ne deziris esti utiligita por ŝajnigi, ke mi havis justan proceson.

5. Mi ne atestis dum la unua apelacio en 1995 laŭ konsilo de mia advokato, *Leonard Weinglass*, kiu instrukciis min ne atesti.

6. Hodiaŭ, por la unua fojo, oni donis al mi eblecon rakonti pri kio okazis al mi frumatene la 9an de decembro 1981. Jen kion okazis.

7. Kiel taksi-ŝoforo, mi elektis ofte la vojkrucon inter *Strato 13* kaj *Locust strato* la kaj la *13a strato*, ĉar ĝi estas populara klub-distrikto, kun multaj piedirantoj.

8. Mi veturis taksion por la kompanio “*United Cab*” dum la nokto de la 9a de decembro 1981.

9. Mi kredas ke mi ĵus revenis post liverado de pasaĝero en Orienta Filadelfio.

10. Mi estis pleniganta mian vojaĝ-libron, kiam mi aŭdis kriadon.

11. Ekgrado en mia retro-spegulo montris al mi la flagrolumojn de polica aŭtomobilo. Tio ne estis maloftaĵo.

12. Mi daŭrigis plenigi la paĝon de mia vojaĝ-libro, kiam mi aŭdis sonon similan al pafoj.

13. Mi denove rigardis en mia retro-spegulo kaj vidis homojn kurantajn tien kaj reen en *Locust*.

14. Kiam mi ĉirkaŭrigardis, mi rekonis mian fraton, kiu staris en la strato ŝanceliĝante kaj kapturiniĝinte.

15. Mi tuj eliris el la taksio kaj kuris al lia krio.

16. Kiam mi atingis la straton, mi vidis policiston

en uniformo turniĝintan al mi kun pafilo enmane, vidis fulmon kaj falis surgenuen.

17. Mi fermis la okulojn kaj sidis senmove, provante spiri.

18. Mia posta memoraĵo estis la sento ke oni pied- kaj man-batas min, kaj tio eligis min el dormonebulo.

19. Kiam mi malfermis la okulojn, mi estis cirkaŭita de policistoj.

20. Ili kriegis, sakris, kaptis kaj tiris min. Mi sentis eksvenon, kaj apenaŭ povis paroli.

21. Rigardante tra al polic-amaso ĉirkaŭ mi, mi vidis mian fraton, kun sango fluante laŭ la kolo, kaj policiston, kuŝante surdorse sur la strato.

22. Oni starigis min kaj ĵetis min kontraŭ telefonfosto, batis min, kie mi falis, kaj ĵetis min en malliber-kamioneton.

23. Mi kredas ke mi dormis ĝis mi aŭdis la pordeton malfermiĝi. Blankula policisto kun blanka ĉemizo (uniformo de altranga policisto) envenis sakrante, kaj batis mian frunton.

24. Mi ne ne memoras ekzakte kion li diris krom multaj “*fi-nigrulo*”, “*nigraj patrin-fikuloj*” ktp.

25. Mi kredas ke li foriris kaj mi dormis. Mi ne memoras kiam la kamioneto ekiris, nek dum

kiom da tempo.

26. Je mia veko, mi aŭdis la ŝoforon paroli per sia radio, pri sia kaptito.

27. La anonima voĉo el la radio, informas min ke mi iras al administrejo de la polico, kiu estis proksima de tie.

28. Poste mi kredis aŭdi iun diri ke la indiko estis "M-1", kaj oni ordonis iri al Hospitalo *Jefferson*.

29. Alvene, oni ĵetis min teren el la kamioneto kaj batis min.

30. Mi denove estis batita ĉe la enirejo de la hospitalo.

31. Pro la sango en miaj pulmoj, estis malfacile paroli, ne eblis krei.

32. Mi neniam konfesis ion ajn, ĉar mi havis nenion konfesendan.

33. Mi neniam deklaras ke mi pafis al la policisto. Mi ne pafis la policiston.

34. Mi neniam diris, ke mi esperas ke li mortis, mi neniam dirus ion tian.

Mi deklaras kontraŭ puno pro ĵurrompo laŭ la Usona juraro, ke la supra teksto estas vera kaj ĝusta, kaj estis plenumita de mi la 3-an de Majo 2001 en *Waynesburg*, Pensilvanio.

Usono: seninterrompa subpremo

Laŭ la Usona ŝtato, en ĝiaj prizonoj neniun malliberulon oni povas taksi politika. Cetere, multaj aliaj landoj samopinias.

Fakte, multaj unuopuloj estis celumitaj, persekutitaj kaj forĵetitaj en la usonajn gulagojn pro siaj opinioj, engaĝiĝoj kaj/aŭ siaj politikaj agadoj. La ĵusa liberigo de pluraj portorikanaj sendependistoj, fine de longa mallibereco en la federalaj prizonoj konsistigas pruvon pri ne-vortigita agnosko pri la ekzisto de militkaptitoj. Ĉu subite ili estus iĝintaj politikaj malliberuloj post jardeko pasigita en la usonaj prizonoj ?

Dekoj da soldatoj de la “*Nigrula Liberiga Armeo*” estas ĝis nun en la usonaj gulagoj, iuj de antaŭ tridek jaroj. Ĉu ili estas malpli politikaj kaptitoj ol siaj portorikanaj kamaradoj nur ĉar la politika potenco ne aŭdacis liberigi ilin ?

Geronimo Ji-Jaga ne abrupte iĝis politika malliberulo ĉar juĝisto de Oranĝa distrikto en Kalifornio decidis ke liaj konvinkoj malkongruas kun la konstitucio de tiu ŝtato. Kion diri pri tiuj

26 jaroj da politika enkarcerigo ? Jaga provis akiri esprimliberecon jarojn antaŭe, sed malgraŭ ekzempla dosiero, oni rifuzis ĝin al li pro unu nura kialo: ke li “*ankoraŭ estas revoluciulo*”. Tamen, Usono asertas ke ĝi tenas neniun politikan kaptiton.

Estas ankaŭ la politikaj kaptitoj de “*MOVE⁽¹⁾*”, kiujn oni povas ankaŭ nomi prosperitajn mal-liberulojn, en la ekzakta senco de la termino. Ili estis kondamnitaj je cent jaroj da enkarcerigo en la gulagoj de Pensilvanio, malgraŭ sia senkulpeco, pro rifuzo fornei sian akordiĝon al instruoj de *John Afrika*, la legenda revoluciulo, fondinto de la organizado *MOVE*. Naŭ viroj kaj virinoj el *MOVE* erare akuzitaj pri kunpafado kontraŭ policisto en Filadelfio la okan de aŭgusto 1978, ricevis maksimuman punon dum pluraj aliaj membroj de *MOVE*, teruritaĵ de la ŝtatperforto malagnoskis sian fidelecon al *MOVE*, kio permesis al ili gajni liberecon. Tamen la membroj de *MOVE* estas ankoraŭ en prizono, 22 jarojn poste, ĉar iliaj principoj estas tro fortaj por fornei la memoron de *John Afrika*! Tute ne pro krimo. Ĉu ili ne estas politikaj, prosperitaj kaptitoj de ŝtato ? En Usono la lojaleco estas krimo.

Kiam iu membro de *MOVE* nomita *Ramona Afriko* permesis al si postvivi urban holokaŭston okazintan je la 13a de majo 1985⁽²⁾, nur ŝi estis

enprizonigita kaj ne la infanmurdintoj aŭ la bombmetintoj de la urbo, de la ŝtato aŭ de la federala registaro. Dum sep longaj kaj teruraj jaroj, *Ramona* estis enŝlosigita en la ŝtatĉeloj dum la murdintoj de *Osage*-avenuo akiris promociojn, avancojn kaj laŭdojn. Ĉu ŝi estis malliberulino de la politika ordo ?

Estas multaj viroj kaj virinoj kiuj stagnoputradas en la usonaj prizonoj kaj kies nomoj estas nekonataj al ni: *Sundiata Acoli*, la fratoj kaj fratinoj *Afrika*, *Bashir Hameed*, *Mondo We Langa*, *Sekou Odinga*, *Russel Maroon Shoats*, *Joan Karl Loaman*, *Ray Luc Levasseur*, *Tom Manning*, *Yi Kikumaara* kaj multaj aliaj⁽³⁾. Kial ili estas nekonataj ? Ĉar ne ekzistas politikaj malliberuloj en Usono, ĉu ne ?

Mumia Abu Jamal

⁽¹⁾ La 13an de marto 1998, *Merle Africa* mortis pro kancero en prizono, en misteraj cirkonstancoj.

⁽²⁾ Mumia referencas ĉi-tie militbombadon de la MOVA-domo situanta en *Osage*-strato en Filadelfio la 13an de majo 1985.

⁽³⁾ Vd. Komitato kuraĝo ne estas enkarcerigebla: political prisoners in the U.S.A. Komitato por ĉesigi izolitecon de Mariona-pundomo : chi.li.CEML@aol.com.

Tria parto

FAKTOJ KAJ ARGUMENTOJ

Historio

En la Antikveco, la mortopuno evoluis el la tiama reganta sangoprincipo, laŭ kiu la viktimoj mem juĝis kaj punis la krimulon, provokante senhaltan sekvon de venĝoj. La starigo de la leĝo pri egala repago, kiu celis puni krimon per ekvivalentaĵo (okulon pro okulo), estis la unua provo pri socia pritrakto de tiuspecaj konfliktoj.

De la antikveco ĝis la fino de la 18a jarcento, mortopuno neniam estis abolita, eĉ se en kelkaj mondopartoj ĝi tute ne aplikiĝis dum plurjarcentaj periodoj. Foje ĝia aplikokampo estis tre limigita, dum alfoje eĉ malgravaj deliktoj povis esti punataj per ĝi. Dum longa tempo la praktikadon de mortopuno faciligis la forta religio. La fizika malaperigo de la korpo ne estis tiom ĝena, ĉar ĉefe gravis la savo de la animo, kiu okazis en la “*transa mondo*”). Dum duono el la virinoj mortis dum akuŝo kaj infanoj ofte ne atingis plenkreskecon pro diversaj malsanoj, la morto estis io relative banala, kaj tial pli facile akceptebla. En Japanio, la naturaj katastrofoj krome kutimigis la homojn al abrupta vivoperdo, kontraŭ kiu ne eblas ribeli.

Dum la 18a jarcento leviĝis en Eŭropo la unuaj voĉoj por kontraŭi mortopunon. Unu el la plej

influaĵ estis Bekarja, kies verkoj influis interalie la Granddukon de Toskanio. Toskanio tial iĝis en 1786 la unua ŝtato en la mondo, kie mortopuno estis abolita.

Okaze de la Franca Revolucio, estis en 1791 pridiskutita ĉe la Nacia Asembleo propono pri nova punkodo. Tiam pluraj personoj argumentis favore al la abolo de mortopuno, interalie Robespiero. Sed la asembleo fine voĉdonis por ĝia konservo, tamen enkondukante ioman egal-econ per sistema uzo de gilotino. Ĉiuj mortpunitaj homoj estis de tiam principe senkapigitaj en Francio, dum tio antaŭe estis privilegio rezervita al la nobela klaso. Krome reduktiĝis la aplikokampo al 32 krimoj anstataŭ 115 en la malnova leĝo (*Camus*, 1957).

En Anglio, la mortopuno preskaŭ malaperis fine de la 18a jarcento, sed estis abunde reenkondukita komence de la 19a jarcento. Tiam regis la “*Sanga kodo*”, responde al oftaj krimoj kaj atencoj kontraŭ privata proprieto, provokitaj de la kreskanta mizero en la novaj industriaj urboj. Tiuj ĉi krimoj forte tremigis la burĝaron, kaj puŝis ĝin al serĉo de panacea solvo por ĉiuj deliktoj. Tiel etendiĝis la motivoj por mortopuno ĝis proksimume 230 deliktoj kaj krimoj, el kiuj la ŝtelo de napoj, la sendo de minacleteroj, la asociiĝo kun ciganoj, aŭ la kostumita ĉeesto en arbaro. Samepoke la mortopuno ne plu aplikigiĝis

por krimoj kontraŭ la privata proprieto en la ceteraj eŭropaj landoj. En Anglio, la mortopuno estis do denove aplikata kvankam la krimeco tie estis multe malpli alta ol en aliaj eŭropaj landoj. En Londono en 1785, el 97 ekzekutitaj krimuloj, nur unu estis murdisto. Ĉiuj aliaj estis nur ŝtelistoj. La apliko de mortopuno cetere ankaŭ etendiĝis al infanoj. Kestlero citas la kazon de 13-jara knabo, kiu en 1801 estis pendumita ĉar li ŝteleniris en hejmo, kie li forprenis kulereton. Pendumiloj estis banalaj elementoj de la anglaj pejzaĝoj, kaj mortigoj restis surloke dum foje pluraj semajnoj. La publikaj ekzekutoj estis aparte ŝatataj spektakloj, kiuj kondukis al elmontroj de kolektiva histerio. En 1807, okaze de la ekzekuto de du kondamnitaj (Holoŭajo [*Holloway*] kaj Hagertio [*Haggerty*]), la deliro en la 40 000-persona ĉeestantaro estis tia, ke restis centoj da kadavroj surloke fine de la “*spektaklo*”. Kompreneble la ŝato al tiuj spektakloj estis komerce ekspluatita de senskrupulaj elturniĝemuloj, kiuj ekzemple konstruis aŭ luis spektejojn por tiuj, kiuj pretis pagi (*Koestler*, 1957).

En 1863, Venezuelo estis la unua latinamerika ŝtato, kie estis abolita mortopuno. Sekvis en 1865 San Marino, kie la mortopuno fakte ne plu uziĝas de 1468. Dum la 20-a jarcento, kaj precipe post la dua mondmilito, plifortiĝis la movado

por abolo de mortopuno. Influaĵoj intelektuloj, kiel Arturo Kestlero en Anglio kaj Alberto Kamuso en Francio energie batalis por konsciigi siajn samtempulojn pri la senhomeco de tiu ĉi puno. La Eŭropa Konsilio produktis diversajn jurajn dokumentojn, kiuj iom post iom kondukis al ĝia malapero, almenaŭ dum paca tempo, en ĉiuj membroŝtatoj escepte de Rusio. Ankaŭ en Usono komplete malaperis mortopuno komence de la 1970-aj jaroj, antaŭ reenkonduko en 38 el 50 federalaj ŝtatoj. En Oceanio, la unua ŝtato, kiu abolis mortopunon, estis la eksa brita kolonio Tuvalu, en 1976. En Afriko pioniris Kabo Verda en 1981, kaj Kamboĝo estis la unua abolista ŝtato en Azio, en 1989.

Mortopuno tra la mondo en 2007

Laŭ la ĝisdatigitaj informoj de Amnestio Internacia (2006) kaj ECPM (2007), nuntempe 125 ŝtatoj abolis jure aŭ fakte la mortopunon. En 74 ŝtatoj ĝi plu estas aktuala, kvankam nur kelkaj uzis ĝin dum la lastaj jaroj. 91 % el la konataj ekzekutoj en la jaro 2006 venis el ses landoj:

Ĉinio kun almenaŭ 1010 agnoskitaj ekzekutoj,
sed la reala cifero eble estas ĉirkaŭ 8000.

Irano: 177

Pakistano: 82

Irako: almenaŭ 65

Sudano: 65

Usono: 53

**90 ŝtatoj plene abolis mortopunon.
Jen ilia listo, kun indiko pri la abolojaro:**

Albanio 2007	Germanio 1949 (Ok-
Andoro 1990	cidente) 1987
Angolo 1992	(Oriente)
Armenio 2003	Grekio 2004
Aŭstralio 1985	Gvineo 1993
Aŭstrio 1950/1968	Ĝibutio 1995
Azerbajĝano 1998	Haitio 1987
Belgio 1996	Hispanio 1995
Bosnio-Hercegovino	Honduraso 1956
2001	Irlando 1990
Britio 1998	Islando 1995
Bulgario 1998	Italio 1994
Butano 2004	Kabo-Verda 1981
Ĉeĥio 1990	Kamboĝo 1989
Danio 1978	Kanado 1976
Domingo 1966	Kipro 2002
Eburbordo 2000	Kirgizio 2006
Ekvadoro 1906	Kiribato 1979
Estonio 1998	Kolumbio 1910
Filipinoj 2006	Kostariko 1877
Finnlando 1972	Kroatio 1990
Francio 1981	Liĥtenŝtejno 1987
Georgio 1997	Liberio 2005

Litovio 1998	Samoo 2004
Luksemburgo 1979	Sankta Tomaso kaj Principeo 1990
Maŭricio 1995	Sanmarino 1865
Makedonio 1991	Sejŝeloj 1993
Malto 2000	Senegalo 2004
Marŝalaj insuloj 1986	Serbio 1995
Meksiko 2005	Slovakio 1990
Mikronezio 1986	Slovenio 1989
Moldavio 2006	Sudafriko 1997
Monako 1962	Svedio 1972
Montenegro 1995	Svisio 1992
Mozambiko 1990	Timoro Orienta 1999
Namibio 1990	Turkio 2006
Nederlando 1982	Turkmenio 1999
Nepalo 1997	Tuvalo 1978
Nikaragvo 1979	Ukrainio 2000
Niuo 2004	Ungario 1990
Norvegio 1979	Urugvajo 1907
Novzelando 1989	Vanuatuo 1980
Palaŭo 1994	Vatikano 1969
Panamo 1903	Venezuelo 1863
Paragvajo 1992	
Pollando 1997	
Portugaliao 1976	
Rumanio 1990	
Salomonoj 1978	

La dek sekvaj ŝtatoj abolis mortopunon nur por la komunjuraj deliktoj, sed ne en kazo de milito aŭ esceptaj cirkonstancoj :

Argentino 1984	Kuk-Insularo neniam aplikita
Bolivio 1997	Latvio 1999
Brazilo 1979	Peruo 1979
Ĉilio 2001	Salvadoro 1983
Fiĝioj 1979	
Israelo 1954	

La 28 jenaj ŝtatoj praktike ne aplikis mortopunon de almenaŭ dek jaroj:

Alĝerio	Maldivoj
Benino	Malio
Brunejo	Maroko
Burkino	Maŭritanio
Centrafrika	Birmo
Respubliko	Nauro
Gabono	Nigero
Gambio	Papu-Nov-Gvineo
Ganao	Rusio
Grenado	Srilanko
Kenjo	Surinamo
Kongo PR	Togolando
Madagaskaro	Tongo
Malavio	Tunizio

Kaj fine, jen la ŝtatoj, kiuj plu uzas mortopunon:

Afganio	Irano
Antigvo-Barbudo	Jamajko
Bahamoj	Japanio
Bangladeŝo	Jemeno
Barbado	Jordanio
Barejno	Kamerunio
Belizo	Kataro
Belorusio	Kazaĥio
Bocvano	Komoroj
Burundio	Kongo DR
Ĉadio	Kubo
Ĉinio	Kuvajto
Dominik	Laoso
Egiptio	Lesoto
Eritreo	Libano
Etiopio	Libio
Guyana	Malajzio
Gvatemalo	Mongolio
Gvineo	Niĝerio
Gvineo Ekvatora	Norda Koreio
Hindio	Omano
Indonezio	Pakistano
Irako	Palestina teritorio

Ruando	Tajlando
Saŭd-Arabio	Tajvano
Sankta-Kito kaj	Tanzanio
Neviso	Turka respubliko
Sankta Lucio	nordkipra
Sankta-Vincento kaj	Trinidado kaj Tobago
Grenadinoj	Ugando
Sieraleono	Unuiĝintaj Arabaj
Singapuro	Emirlandoj
Sirio	Usono
Somalia	Uzbekio
Sudano	Vietnamio
Sudkoreio	Zambio
Taĝikio	Zimbabvo

Argumentoj

Atenco kontraŭ Homaj Rajtoj

Mortopuno estas ekstrema, kruela, malhoma kaj sendigniga puno; ĝi estas atenco kontraŭ la vivoraĵo. Mortopuno estas ago konscie preparita, sub leĝa ŝirmo, por senigi homon je la vivo. Kiam ŝtato decidas, kiu el ni rajtas vivi aŭ morti, la koncepto pri memvaloro de ĉiu aparta vivo malpreciziĝas. Same kiel torturo, ankaŭ ekzekuto forneas nian komunan humanecon. La rajto pri la vivo estas la plej fundamenta el la homaj rajtoj, sen kiu ĉiu ajn alia rajto ĉesas ekzisti. Kiam ŝtato uzas sian potencon por malaperigi vivon, tiam ni rajtas pensi, ke neniu rajto estas garantiota. Ŝtato ne povas doni la vivon, ĝi do ne devas forpreni ĝin. Cetere, eĉ gepatroj, kiuj donis vivon al siaj infanoj, jam de longe ne plu rajtas forpreni ĝin!

Ĉu vere demokrate pravigebla?

Multaj politikistoj provas pravigi la pluan uzon de mortopuno menciante la “*opinion de la ĝenerala plimulto*”, dum multaj registaroj abolis ĝin

malgraŭ la fakto, ke la plimulto de la civitanoj plu favoris ĝin. Estas sciata, ke la publikan opinionon eblas facile manipuli, interalie per emfazo de emocivekaj faktoj kaj prisilento de aliaj pensinstigaj elementoj, kiel la fakto, ke ankaŭ ekzistas krimoviktimoj, kiuj firme kontraŭas mortopunon. Sed preter tio ĉi, eĉ la nekontestebla kolero de iuj viktimoj ne povas pravigi la uzon de mortopuno. La devo respekti la homan vivon, kia ajn ĝi estas, superas ĉiujn devojn, kiujn oni povas krei per leĝoj. La respekto al la homaj rajtoj estas universale deviga, kaj tute ne devas dependi de la ŝanĝiĝema “*ĝenerala publika opinio*”, kreata de la amaskomunikiloj je la servo de la reganta klaso.

Ĉu ekzemplodona puno?

Tio estas unu el la ĉefaj argumentoj de ĝiaj defendantoj. Tamen praktike konstatablas forta tendenco al kaŝado de la ekzekutoj, ekde la mezo de la 19a jarcento. Iom paradokse, ekzemple, la lasta publika ekzekuto okazis en Francio en 1939. Kaj ĝuste pro la amasa ĉeesto de ĵurnalistoj, kiuj abunde fotadis la eventon, la registaro opiniis malsaneca tiun sadisman elmontron, kaj decidis ke la ekzekutoj de tiam iĝos privataj. Cetera montriĝis, ke multaj krimuloj antaŭe spektis publikan ekzekuton, kaj tio tute ne detenis ilin de

krimado. Kamuso citas du studojn el Anglio, laŭ kiuj komence de la 20a jarcento, el 250 pendumitoj, 170 persone spektis ekzekuton. En 1886, el 167 kondamnitaj, kiuj pasis tra la malliberejo de Bristol, 164 spektis almenaŭ unu ekzekuton antaŭe (Camus, 1957). Plie, por esti vere ekzemplodona, ekzekutoj devas esti sufiĉe oftaj, kio supozigas oftecon de la krimoj, kiun ĝi devus malebligi... Do, eĉ el simple logika vidpunkto, tiu argumento ne povas validi.

Ĉu efika puno?

Specifa, malinstiga efiko de mortpuno neniam pruviĝis. Multaj studoj komparantaj landojn, kun similaj kulturoj aŭ leĝaj strukturoj, montris, ke pluigo aŭ abolo de la mortpuno neniel influas la krimokvanton (*Hood, 2003*). En Usono, la ŝtatoj neaboliciintaj atingas krimajn procentojn pli altajn ol la aliaj. Plie, sangokrimoj estas plejparte farataj en momento de granda angoro, kaj tiam la krimantoj ne pensas pri la sekvoj de sia faro. Racia elekto, influata de antaŭvidita puno, tiam ne povas okazi. Koncerne la antaŭplanitajn krimojn, la murdontoj ĉiam esperas eviti persekutojn kaj punojn. La teroraj politikaj faroj ankaŭ ne estas influataj de la ekzisto de la mortopuno. La mortotimo restas senefika ĉe personoj, kiuj pretas je vivofero en nomo de ideologio, kiu

honoras siajn martirojn.

Jam en 1764 Bekarja rimarkigis, ke “*severeco naskas senpunecon*”, ĉar kiam la krimoj iĝas severe punataj, la krimuloj paralele iĝas pli fortaj kaj nenion timas. Aldona efiko estas, ke juĝantoj hezitas apliki punojn, kiuj ŝajnas ekstermezure severaj. Kestlero (1957) tion apogas citante la kazon de anglaj tukolavistoj, kiuj en 1811 peticiis por ke la ŝtelo de tukoj en lavejoj ne plu estu punata per mortopuno, ĉar ili konstatis, ke la juĝantoj preferas senkulpigi kaj liberigi la arestitojn, anstataŭ kondamni ilin al morto. Do, evidentiĝas ke mortopuno estas senefika kaj maltaŭga rimedo.

Ĉu solvo malpli kosta por la socio?

Simpliga argumentado povus kredigi, ke mortopuno estas malmultekosta solvo por malaperigi senutilajn, aŭ malutilajn ulojn. Sed praktike, en la landoj kie la kondamnitaj tamen ĝuas kelkajn jurajn garantiojn, la multeco de la apelaciaj proceduroj igas ilin resti foje plurajn jardekojn en malliberejo. Laŭ studo de A.I. en Usono (Amnestio Internacia, Usono, 2006), la mortkondamnitaj eĉ estas pli kostaj, ĉar ili postulas pli rigoran prizorgadon, kaj krome multe pli emas uzi ĉiujn siajn apelaciaĵojn ol tiuj, kiuj estas

kondamnitaj al malliberiĝo.

Se sekvi tian nehoman financistan rezonon, cetere ankaŭ oportunos rezigni pri financa helpo al mensaj kaj fizikaj handikapitoj. Tamen tion malmultaj aŭdacas proponi. Kial do aparte rifuzi helpi al la socihandikapitoj, kiujn oni nomas krimuloj?

Eĉ pli ol justa puno

La mortopuno estas multe pli terura ol la krimo, kiun ĝi pretendas puni. Kamuso tiurilate skribas: “*Kio do estas la mortopuno, se ne la plej antaŭvidita el ĉiuj krimoj, al kiu eĉ la plej kalkulita fiaĵo ne povas esti komparita? Por atingi ekvivalentecon, necesus tiel puni krimulon, kiu avertus sian viktimon pri la momento kiam ĝi mortigos ĝin, kaj ekde tiam, detenus ĝin en kaptiteco kun ĉiuj povoj super ĝi dum pluraj monatoj. Tian monstron oni ne renkontas inter privatuloj.*” (Camus, 1957). Nun tiujn monstr-aĵojn eblas plu spekti en la laŭdire civilizita Japanio, kie mortkondamnitaj estas submetitaj al senĉesa videokontrolo (por malebligi memmortigon), ne rajtas fari ion ajn, kaj estas informitaj pri sia ekzekutohoro nur inter 45 kaj 60 minutoj antaŭe (FIDH, 2003). Cetere, al tiuj psiĥologiaj turmentoj aldoniĝas tiuj truditaj al la familianoj

de la mortigito. En Japanio, estas raportitaj kazo de familianoj, al kiu estis rifuzite vizitorajto de mortkondamnito sub la preteksto, ke li estas okupita. Kelkajn horojn pli poste oni informis la familianojn, ke li fakte estis dume ekzekutita. Kaj la ideo pri venĝo estus eventuale akceptebla, se unuflanke starus tute senkulpa viktimo, kaj aliflanke pekoplana kulpulo. Sed ĉu la socio ne iel respondecas pri la krimuloj, kiujn ĝi produktas? Tiurilate Kamuso siatempe rimarkigis (*Camus*, 1957), ke alkoholismo estas tre ofta ĉe krimuloj, aparte ĉe infanturmentantoj, sed ke alkoholvendado estas ekstreme profitodona negoco...

Definitiva, kvankam eraripova

Ekzekuto estas definitive neŝanĝebla, kaj povas trafi senkulpulojn. Eĉ en landoj, kie la leĝaraj sistemoj kaj la juraj garantioj estas maksimume fidindaj, ekzistas dokumentoj, kiuj pruvas, ke oni mortkondamnis kaj ekzekutis senkulpulojn, antaŭ ol ilia senkulpeco estis agnoskita. En Usono, ekde 1976, 122 homoj estis ellasitaj el la mortopuno, ĉar evidentiĝis ke ili estas senkulpaj. Kvar personoj estis ekzekutitaj, kaj nur poste evidentiĝis, ke ili estis senkulpaj (*Amnesty International*, 2007). *Wang Ĵenĉuan* publike agnoskis, ke la plimulto el la juĝeraroj okazintaj en Ĉinio ŝuldiĝas al konfesoj ricevitaj post

turmentado (Philip, 2006). Kiam tiaj kazoj diskonigis en la publiko, ili plej forte impulsis la abolon de la mortopuno.

En multaj neabolintaj landoj, la laŭleĝaj garantioj estas senefikaj, aŭ simple malestas. Tie, la danĝero ekzekuti senkulpulon ege pligrandiĝas. Tiom longe, kiom homo estas en malliberejo, restas ŝanco, ke al ĝi profitos la malkovro de nova pruvo aŭ la alpreno de nova leĝo. Post kiam persono estas ekzekutita, eĉ se pruviĝas ĝia senkulpeco, oni ne redonos al ĝi la vivon.

Kaj eĉ en kazo de kulpintoj, estas kelkaj ekzemploj pri homoj, kiuj plene readaptiĝis al la socia vivo, kaj do povus esti liberigitaj anstataŭ esti leĝe murditaj. Aparte tragika ekzemplo estas tiu de *Norio NAGAJAMA*. Malklera pro malriĉeco, ne povinta sufiĉe ofte viziti mezlernojn kaj humiligita de siaj estroj, li mortigis kvar personojn en la aĝo de 19 jaroj, kaj estis pro tio mortkondamnita. Sed dum sia longa restado en malliberejo, li havis la eblecon studi literaturon, sociologion, filozofion kaj politikon. Li ekverkis librojn, unue kun socikritika enhavo, forte influita de la Rusa Revolucio, kaj poste ankaŭ beletrajn verkojn. En 1983 li eĉ ricevis japanan literaturan premion por sia verko “*Kibaŝi*” (ligna ponto), en kiu li rakontas pri sia 13-jara vivo en malliberejo. Dum li laboris super la kvara volumo de granda

romano, li estis subite interrompita de siaj ekzekutistoj, la unuan de aŭgusto 1997. Li testamentis la tutan monon akiritan pere de siaj verkoj al malriĉaj infanoj el Peruo.

Ĉu vere rapida kaj sendolora?

Malgraŭ la oficialaj mensogoj kaj tabuoj, morto-puno tre ofte estas longa kaj dolora. Tio ŝajnas evidenta pri la mezepokaj mortigrimedoj kaj pri kelkaj plu aplikitaj praaĵoj, kiel ŝtonumado, sed ankaŭ validas por teorie pli efikaj ekzekutmetodoj.

Abundas ekzemploj pri misaj pendumoj, kaj ne nur kiam la ekzekutisto estis ebria. La pendumo foje daŭris kvaronhoron, kaj necesis helpi la viktimon finmorti alkroĉiĝante al ĝiaj piedoj (*Hugo*, 1854). Kestlero (1957) citas la kazon de *Smith* la duonpendumito, kies kondamnonuligo alvenis kvaronhoron post kiam li ekbalanciĝis sub la pendumotrabo. Pere de sangoeltiroj li estis revekita. Li ankaŭ referencas al viktimoj, kiuj revekigis sur la dissekcotablo. Simila kazo estas raportita en Kuvajto, kie transportantoj de pendumito al kadavrejoj konstatis, ke li plu moviĝas, kvankam kuracistoj asertis lin morta. Pli detala ekzamenado montris, ke li mortis kvin horojn post la pendumo (EPCM, 2007). Ankaŭ la teorie rapida kaj nedolora gilotinado estis

objekto de dubigaj studoj kaj atestoj. Pri la neĉiama efikeco de la tranĉilo raportas Viktoro Hugo, kiu referencas al la kazo de *Pierre Hébrard*, gilotinita en Albio la 12an de septembro 1831. Lia kapo ne komplete tranĉiĝis post kvin tranĉilofaloj. La ekzekutisto tiam forfuĝis sub la ŝtonoĵetoj de la publiko. Fine la kondamnito, tenanta sian duontranĉitan kapon releviĝis petante liberiĝon, kaj estis finmortigita surprize de helpezekutisto, kiu alsaltis lin el malantaŭe kaj kun multaj klopodoj fintranĉis la kapon per buĉista tranĉilo.

En Usono, post la fuŝa ekzekuto de *Nieves Diaz*, kiu daŭris 34 minutojn, la 13an de decembro 2006, la injektado de mortigiloj estis provizore haltigita en pluraj usonaj ŝtatoj... ĝis pli efika miksaĵo estos trovita... (ECPM, 2007).

Al la pure fiziologiaj turmentoj aldoniĝas la psiĥaj. *Barbara Gream*, gasto de la Kalifornia malliberejo de *St-Quintin*, ekzemple devis trifoje paŝi al gasĉambro en la sama tago. La du unuaj fojoj estis nuligita la ekzekuto. La unua nuligo okazis nur unu minuton antaŭ ŝia ekzekuto. Ŝi tiam svenis, sed post rekonsciiĝo apenaŭ havis la tempon ĝoji, ĉar oni tuj informis ŝin pri nuligo de la prokrasto, antaŭ rea nuligo. La trian kaj lastan fojon, ŝi do atingis la gasĉambro en stato de plena mensa elĉerpateco (*Leber*, 1980).

Subprema ilo je la servo de la regantaj klasoj

Mortopuno estas ofte uzata kiel sufokrimedo kontraŭ opoziciaj aŭ rasaj, etnaj, religiaj, ekonomie malfortaj grupoj. Mortopuno estas maljuste kaj malegale distribuita. Riĉuloj, regantaj politikistoj, anoj de rasaj aŭ religiaj plimultoj multe malpli riskas mortkondamnon kaj des malpli ekzekuton pro samgravaj krimoj, ol malriĉuloj, opoziciaj politikistoj aŭ anoj de rasaj aŭ religiaj grupoj konsiderataj kiel forpelindaj. En Usono, 90 procentoj de la personoj ekzekutitaj pro seksperforto post la jaro 1930 estis nigruloj, 49 procentoj de la ekzekutitaj pro sangokrimoj estis nigruloj, dum en la sama periodo la nigruloj konsistigis 9 procentojn de la tuta loĝantaro. Studoj montris, ke la nigruloj havas multe malpli da ŝancoj, kompare kun la blankuloj, por ricevi malpliigon de puno kaze de samgravaj krimoj. Nuntempe, duono de la mortkondamnitaj estas nigruloj.

En Irako, en la jaroj 1976 kaj 1977, pli ol 200 Kurdoj estis ekzekutitaj.

En Sud-Afriko, inter la jaroj 1947 kaj 1969, el 288 blankuloj kondamnitaj pro seksperforto al neblankulinoj, neniu estis ekzekutita. En la sama periodo, el 844 nigruloj akuzitaj pro la sama krimo al blankulinoj, 108 estis ekzekutitaj.

En Sovetio, 18 krimspecoj estis puneblaj per mortigo, kaj ĉiujare en la oficiala Soveta gazetaro, estis raportoj pri ekzekuto de tridekkelke da personoj (Amnestio Internacia, 1977).

Estas ĝenerale agnoskita, ke la mortopuno estas privilegio de la malriĉuloj. La kaŭzoj estas profundaj: malofta aliro al efika advokata defendo pro manko de monrimedoj; ofte malbona komprenpovo pri la kortuma lingvo; nekapablo uzi la eblojn aŭ avantaĝojn de la leĝara sistemo. Tial, kompare kun personoj kun pli bonaj sociaj situacioj, ili estas, en nombro senproporcie pli granda, mortkondamnitaj pro similaj krimoj.

En kelkaj landoj, mortopuno estas subprema rimedo kontraŭ politikaj opoziciuloj. Aldone al la jam detale prezentitaj kazoj, eblas memorigi i.a. pri la Parizaj Komunumanoj de 1871, kruelge persekutitaj de la venkinta burĝaro, la 12 martiroj de la Kotoku-afero, pendumitaj en 1911 pretekste de atenco kontraŭ la japana imperiestro, sed fakte pro ilia supozita anarĥieco kaj kontraŭstaro al la reĝimo, la revolucia sindikatiso *Joe Hill*, murdita pro falsa akuzo pri krimo en 1915, la geedzoj *Rosenberg*, viktimoj de la kontraŭkomunista histerio en la postmilita Usono, kaj nia SAT-kamarado Sekojo, iama aktivulo por la rajtoj de usonaj indianoj, kaj nun atendanta

ekzekuton en Kalifornia malliberejo pro krimoj, kiuj ne estas vere pruvitaj.

Konataj estas la kazoj de Popola Ĉinio kaj de la Kamboĝo de ruĝaj ĥmeroj. Sed la burĝaj amas-komunikiloj, kiuj regule rememorigas ilin, forgesas ankaŭ mencii la multegajn komunistojn ekzekutitaj en Indonezio, en Tajvano kaj en Suda Koreio, kie 40 procentoj el la 902 postmilitaj ekzekutitoj (ĝis 1997) estis viktimoj de kontraŭ-komunistaj ŝtatsekurecaj leĝoj.

Cetere, ne nur laboristaj aktivuloj viktimiĝas tiumaniere. Mortopuno foje estas laŭleĝa ŝmiraĵo por kontosolvoj inter gangsteroj. En Ĉadio, ne okazis ekzekutoj inter 1991 kaj 2003. Sed ĉar tio kongruis kun la interesoj de registaro, kiu deziris montri sin “*firma*” fronte al eksterlando, ree enkondukiĝis mortopuno en kunteksto, kie ĝi aspektis apenaŭ vualita malaperigo de ĝenuloj laŭ ŝajne leĝa formo. Tio perdis la vivon ne nur al la celitaj ĝenuloj, sed ankaŭ al kelkaj pliaj “*krimuloj*”, kiuj samtempe profitis pri la ĉesigo de la moratorio (FIDH, 2004). En multaj landoj, eksregantoj estas ofte, pro krimoj okazintaj dum sia regado, mortkondamnitaj fare de la novalveninta reĝimo. Multaj personoj konsideras akceptebla la mortopunon, ĉar ĝi frapas la plej malamatajn, nome tiujn, kiuj maltrankviligas la regantajn fortojn

de la socio. Plej freŝdata ekzemplo estas la kazo de Sadamo Husejno, kies rapida malaperigo, post neregula proceso, ebligis malaperigi ĝenulon, kiu povus multon rakonti pri la komplezo de la okcidentaj ŝtatoj, kiuj subtenis lian reĝimon dum tio kongruis kun iliaj kapitalistaj interesoj.

La nocio pri la leĝa respondeco

Dum Mezepoko, eĉ bestoj estis punitaj per mortopuno, ĉar oni kredis ke ili havas animon, do ankaŭ konscion kaj respondecon. Ĉiuj ĝenerale konsentas, ke tio nun aspektas absurda, pro tio ke la bestoj ne estas sufiĉe konsciaj pri siaj agoj, por ke tiaj punoj havu ian efikon. Neniu porkino detenos sin manĝi infaneton pro la scio, ke alia porkino estis pendumita pro tiu sama krimo. Sed kial do tiam mortkondamni mensmalsanulojn? Ja ankaŭ ĉe ili estas klare, ke tiu puno ne povas efiki antaŭaverte. Kaj tamen ĝi plu estas aplikita eĉ en “civilizitaj” landoj, kie ekzemple la demokrata prezidento Klintono interrompis sian balotkampanjon por persone ĉeesti la ekzekuton de profunda mensmalsanulo, kiu deziris konservi sian lastan deserton por frandi ĝin post la ekzekuto (*Wacquant* 2004, p. 200). La problemo kun tiu principo estas, ke ĝi supozigas, ke homoj havus la eblecon elekti alian konduton en difinitaj cirkonstancoj, tiel neante

aŭ malfortigante la ekziston de determinismo psikologia aŭ sociologia. Samtempe ĝi trudas komparon de la supozita kulpulo kun abstrakta “*normala homo*”, kiu ne agus same en la sama kunteksto.

Socia respondeco

La krimeco estas grandparte produktita de malfavoraj vivkondiĉoj. Ofte kondamnitaj estas malpli instruitaj ol mezaj homoj, kaj kreskis en perforteca kunteksto. Studo montris, ke la proporcio de mensmalsanuloj inter usonaj mortkondamnitaj infanoj estas aparte alta (Lewis, 1988). Alia studo en usonaj mensmalsanulejoj montris, ke 81% el la tieaj ĉeestantoj suferis pri fizikaj aŭ seksaj perfortaĵoj dum sia juneco (Maine, 1998). Se paroli pri respondeco, la socio, kiu toleris la kreskon de infanoj en stratoj, en mizero kaj en perforto, certe mem grandparte kreis favorajn kondiĉojn por la apero de tiuj krimuloj, kiujn ĝi poste emas malaperigi. Tion klare substrekas la rakonto de Hugo pri Klaŭdo Miserulo, kaj la deklaro de Ravaŝolo.

Perspektivoj

Kvankam tio ne forigas ĝian abomenan karakteron, mortopuno estas, laŭ mondskala perspektivo, nun relative flanka fenomeno en la diversaj punsistemoj. Sed paralele al la kadukiĝo de mortopuno kreskas la nombro de dumvivaj malliberuloj, kaj la severecco de punoj aplikitaj al malgravaj deliktoj. En Usono, kiu tiukampe estas la inspirofonto de multaj Eŭropaj landoj, eĉ enkondukiĝis la regulo pri la 3a rekulpiĝo, kiu ebligas dumvivan kondamnon eĉ por senperfortaj deliktoj. Tiu tendenco, kiu mondskale esprimiĝas de trideko da jaroj, estas celkonscia apliko de ĝenerala politiko ema al krimigo de la malriĉuloj anstataŭ malaperigo de la malriĉeco. Tute ne hazarde malkreskas la monhelpoj al la plej malfavorataj sociaj tavoloj, dum kreskas la sumoj dediĉitaj al subpremaj agoj. Tio estas ne nur demagoga, sed ankaŭ tre lukra entrepreno, ĉar la mastrumado de tiuj multiĝantaj malliberejoj ĝenerale estas transdonita al privataj firmaoj (*Wacquant, 2004*).

Post la malapero de mortopuno do eble venas la tempo kontraŭbatali la dumvivan malliberigon,

kiu ne estas multe pli homeca pritrakto de deliktuloj. Iuj certe protestos, asertante ke laŭ tiu rezonado, oni ankaŭ povus peti la iaman malaperigon de la tuta malliberiga sistemo. Ja estas efektive neniu konstatebla rilato inter la nombro de malliberigitoj kaj la krimeco en iu difinita lando. Krome nur sensignifa proporcio de deliktoj estas iam iel punitaj. Ekzemple, laŭ ŝtata statistiko, en Usono en 1994, nur 3% el la registritaj deliktoj okazigis fine kondamnon de kulpulo (*Rand*, 1997). Cetere indas rimarkigi, ke la plej grandaj el ĉiuj krimuloj, t.e. la kapitalistoj, ĝenerale eskapas al punado. Tio validas ne nur rilate la krimojn, kiujn pravigas la burĝa leĝaro, kiel armilvendado aŭ detruado de nutraĵoj, sed ankaŭ rilate al efektive eksterleĝaj fraŭdoj kontraŭ la impostokodo, la stirkodo aŭ la laborkodo, kiuj entute ofte kostas pli ol la agoj de la etaj deliktuloj (vd ekzemple *Paille* k *Godefroy*, 1997). Tial, la plena malaperigo de tiu ĉi multekosta sed senfika subprema sistemo tute ne estas absurdaĵo.

Kompreneble, tio ne eblos en unu tago, kaj verŝajne ne povos plene efektiviĝi antaŭ la starigo de senekspluateca sociordo, kie malaperos la ĉefaj fontoj de frustracio kaj perforteco. Sed unua paŝo al tio estus la senhonta agnosko, ke tio ja estas la alstrebinda celo.

Fontoj

Amnestio Internacia, *Stokholma deklaro kontraŭ la mortpuno*, 1977, tradukis P. Signoret, SAT-Amikaro, majo 1980.

Amnestio Internacia, *Jarraporto 2006*.

Amnestio Internacia kaj Obergfoell L., *Badische Zeitung*, p.5, Freiburg, 21a de junio 2007 Rete konsultebla angle, arabe, france kaj ruse ĉe: <http://web.amnesty.org/report2006/index-fra>

Amnestio Internacia USA, *Program to Abolish the Death Penalty*, julio 2006, rete konsultebla ĉe: www.amnestyusa.org/abolish

Camus A., *Réflexions sur la guillotine*, Gallimard, 1957

Ensemble Contre la Peine de Mort (ECPM), *Journal de l'abolition*, eldonita okaze de la 3a internacia kongreso kontraŭ mortopuno, Parizo, februaro 2007

Fédération Internationale des Ligues de Droits de L'Homme (FIDH). *La peine de mort au Japon, une pratique indigne d'une démocratie*. Rapport mission internationale d'enquête, 2003

Fédération Internationale des Ligues de Droits de L'Homme (FIDH). *Tchad. Peine de mort : la levée d'un moratoire, entre opportunisme sécuritaire et rè-*

glement de compte. Rapport mission internationale d'enquête, 2004

Hood R., *The Death Penalty: A Worldwide Perspective*, Oxford University Press, 2003

Hugo V., *Préface au Dernier jour d'un condamné*, 1832 (Eldono kun notoj de G. Rosa, 1989)

Hugo V., *L'affaire Tapner – Lettre à Lord Palmerston*, 1854

Koestler A., *Réflexions sur la potence*, franca traduko, Gallimard, 1957

Leber K. B., *Todesstrafe – Ursprung – Geschichte – Opfer*, 1980 [japana traduko en 1989]

Lewis D.O., Pincus J.H. et al., *Neuropsychiatric, psychoeducational, and family characteristics of 14 juveniles condemned to death in the USA*, American Journal of Psychiatry, Vol. 145, 1988.

Maine, *DMAJRSAS*, 1998

Paille C., Godefroy T. *Coûts du crime. Une estimation monétaire des infractions en 1996*, CESDIP, 1996.

Philip B., *Chine: le pouvoir reconnaît l'usage de la torture par la police*, en *Le Monde*, eldono de la 22/11/2006

Rand M., *Criminal Victimization in the United States*, 1994, Bureau of Justice Statistics, 1997

Wacquand L., *Punir les pauvres*, Agone 2004

Glosoj

Jen kelkaj klarigoj pri esperantigitaj nomoj ne troveblaj en PIV 2005.

Albio: sudfrancia urbo, ĉe la Pireneoj
(43° 55' 44" N, 2° 8' 47" Or).

Barilo San-Jakvo: iama suda limo de Parizo, kie la registaro ekzekutis mortkondamnitajn, kiam ĝi ne plu aŭdacis tion fari en la urbocentro.

Bekarja: itala filozofa kaj politikisto, unu el la plej fruaj kontraŭuloj de mortopuno (Cesare Beccaria, 1738-1794).

Emilo: titolo de fama verko de JJ Rusoo (Rousseau) pri edukado.

Kamuso, Alberto: franca verkisto (Albert Camus, 1913-1960).

Karnoto: franca prezidanto, murdita dum sia mandato (Marie François Sadi Carnot 1837-1894).

Kestlero, Arturo: angla verkisto (Arthur Koestler, 1905-1983).

Klarvaÿso: urbo en Nordokcidenta Francio, kie plu troviĝas unu el la ĉefaj landaj malliberejoj (48° 07' 19" N, 4° 47' 27" Or).

Klemento, Jakvo: franca katolika monaĥo, kiu murdis la reĝon Henriko la Tria (Jacques Clément, 1567-1589).

Montbrizono: urbo en centra Francio (45° 36' 29"N, 4° 3' 56" Or)

Pamjerso: sudfrancia urbo, ĉe la Pireneoj (01° 36' 42 N, 43° 07' 03 Or).

Rekluzo, Elizeo: franca geografo, anarĥiista aktivulo kaj verkisto (Elisée Reclus, 1830-1905).

Robespiero, Maksimiliano: franca advokato, verkisto kaj politikisto, unu el la ĉefaj gvidantoj de la jakobenoj dum la Franca Revolucio de 1789 (Maximilien de Robespierre, 1758-1794).

Rodoguno: parta princino (2a jc a.k.), kaj heroino de samnoma tragedio de Kornelio.

Sankta Ĉamondo: urbo en centra Francio (45° 28' 39" N, 4° 30' 55" Or)

Trojeso: urbo en Nordokcidenta Francio (48° 17' 59" N, 4° 04' 45" Or).

Kio estas la *eldona fako* *kooperativa de SAT* ?

La eldona fako kooperativa estis kreita komence de 2007, post referendumo sekve al propono en la beograda SAT-kongreso de 2006. Ĝi celas faciligi la plenumon de la statutaj taskoj de SAT per eldono de kleriga materialo, pretigita kadre de kolektiva laboro kaj kun laŭeble kohera eldonpolitiko, ankaŭ kolektive difinita.

La eldona fako estas kooperativa. Tio signifas ke ĝi financas siajn eldonojn per la profito akirita dum la vendo de antaŭaj eldonoj. Tiu sistemo ebligas ankaŭ eldonon de valoraj libroj, kies vendobleco estas limigita.

Kvankam la eldonprezoj por la paperaj eldonaĵoj de la kooperativo estas kiel eble plej malaltaj, ili tamen certe restos tro altaj por kelkaj kamaradoj. Tial estas antaŭvidite senpage havigi 10 procentojn el ĉiuj eldonitaj libroj al nepagipovaj kamaradoj. La eldona fako celas zorgi ankaŭ pri elektronikaj eldonoj, por faciligi la diskonigon de dokumentoj ne adaptitaj al la papera formato, kaj plu plialtigi la kvaliton de la SAT-kultura retejo.

Pliaj informoj estas haveblaj ĉe:

SAT – eldona fako kooperativa
67 avenue Gambetta - FR- 75020 Paris

eldonkoop@satesperanto.org

Kio estas SAT ?

SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) estas la plej grava tutmonda organizaĵo de laboristaj esperantistoj. Ĝi estas asocio, kiu celas faciligi la translingvajn kaj transnaciajn rilatojn inter tiuj homoj, kiuj luktas por mondo sen klasa nek alitipa ekspluatado.

SAT grupigas homojn ĝenerale kun maldekstraj opinioj, el ĉiuj ideologiaj tendencoj, kiuj trovas en komuna agado sian unuon. Krome, SAT estas, laŭ sia nomo, sennacieca, tio estas, tute ne gravas la nacio nek ŝtato al kiu ĝiaj anoj apartenas, kaj la asocio ne havas naciajn filiojn. Ĝi tamen kunlaboras je nacia nivelo kun la t.n. Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEAoj), kiuj informas pri Esperanto kaj zorgas pri ĝia instruado sur diversaj lingvoteritorioj.

Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de Esperanto kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aux plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

Konkrete, SAT plenumas siajn celojn per :

- faciligo de rektaj ideinterŝanĝoj inter membroj pere de reta adresaro, dissendolistoj kaj kongresaj debatoj;
- eldono de la monata *Sennaciulo*, kun dosieroj pri aktualaj socipolitikaj problemoj, pritraktitaj de kunlaborantoj el diversaj mondopartoj, kaj informoj pri la agado de laboristaj esperantistoj tra la mondo;
- eldono de la jara *Sennacieca Revuo*, kun ampleksaj eseoj, originale verkitaj de esperantistoj aparte kompetentaj en la pritraktita fako, kaj beletraĵoj;
- disponigo de abunda kleriga materialo en la retejo « *SAT-Kulturo* »;
- eldono de libroj kaj broŝuroj.

pliajn informojn vi ricevos ĉe:

SAT - 67 avenue Gambetta
FR- 75020 Paris

<http://satesperanto.org>

